# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1975






Fileto de ministo

skulptita de **Caj Hiuki**

I 19034

# Sukcesis anestezo per ĉinaj tradiciaj drogoj



Eksperimentado sur korpo de besto



Medicinaj laborantoj de la Hospitalo sub la Hjuĝoŭ-a Medicina Instituto faras drogherban anestezadon al paciento antaŭ la operacio.



Anesteza doktoro Vang Jantaŭ interŝanĝas spertojn kun aliaj pri drogherba anestezo.



Membroj de la esplora grupo de drogherba anestezo foliumas librojn pri la ĉina medicino.







Kolekti drogojn en profundaj montoj





Stramonioj kultivataj de la medicinaj laborantoj



Ekstrakti anestezaĵon

Maldekstre: Caŭ Pejjing, al kiu oni faris operacion por rekunigi ŝian rompitan brakon per drogherba anestezado, rakontas al medicinaj laborantoj pri ŝia sento dum anestezado.



Medicinaj laborantoj vizitas pacientinon, resaniĝintan post operacio per drogherba anestezado.



La esplora grupo de drogherba anestezo en faka diskutado



Konigi al nudpiedaj kuracistoj scion pri drogherba anestezo

# Ne Estas Inflacio en Nova Ĉinio

EN la Okcidento la inflacio estas rigardata kiel "fantomo". En la nuna tempo kiam la "fantomo" denove vagas en la ĉefaj kapitalismaj landoj, kia estas la stato de Ĉinio? Tio aparte altiras la atenton de la mondo.


En la nova Ĉinio ne estas inflacio. La ĉina popolo, kiun plej dolore katastrofis longtempa inflacio dum la malnova socio, nun ne plu bezonas timi devaluton, altiĝon de prezoj, senlaboriĝon kaj pezajn impostojn. Ilia vivo estas sekura kaj agrabla. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, ili batalas kun plena fido por konstrui sian socialisman patrolandon kaj belan estontecon.

## RENMINBI — STABILA PAPERMONO

Renminbi estas la unika mono, uzata en la nova Ĉinio. Dum la mono de la kapitalisma mondo konstante troviĝas en ĥaosa stato, la valoro de Renminbi tamen ĉiam restas stabila sen ia ŝanĝiĝo, ĝi perdis neniom el sia aĉetpovo.

Ĝia stabileco koncentre manifestiĝas en la longtempa stabileco de la prezoj en la merkato. Ekzemple, per du juanoj da Renminbi (egale al unu usona dolaro) oni povas aĉeti en Pekino 5 kilogramojn da rizo, aŭ 5 kilogramojn da faruno, aŭ 1.4 kilogramojn da ŝafviando, aŭ 1.3 kilogramojn da bovviando, aŭ 15 kilogramojn da ajlo, aŭ 2.3 metrojn da blanka kotonŝtofo. La podetalaj prezoj de tiuj varoj preskaŭ neniam ŝanĝiĝis ekde 1952. Ankaŭ la prezoj de aliaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj kaj medikamentoj estas malaltaj kaj stabilaj kiel luprezo de loĝdomo, elspezoj por elektro, akvo, poŝto kaj veturado. Sole la meznombra prezo de medikamentoj en la tuta lando malpliiĝis en 1972 per 80% kompare kun tiu de 1950. La luprezo por loĝdomo ĝenerale okupas nur 3-5% de la salajro. Nur la prezoj de malmultaj vivaj estaĵoj kaj freŝaj legomoj kaj fruktoj varias en malsamaj sezonoj, sed la ŝanĝiĝo de iliaj jaraj meznombraj prezoj estas tre malgranda. En la lastaj 7-8 jaroj la meznombra podetala prezo por kilogramo da legomo en Pekino restis iom pli ol 0.08 juano.

Por ŝanĝi la malracian proporcion de prezoj inter industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj postlasitan de la malnova Ĉinio kaj por pliapaŝe firmigi la aliancon inter la laboristaro kaj kamparanaro, la ŝtato laŭplane paŝo post paŝo altigis la aĉetprezojn de greno, kotono, oledonaj fruktoj, lino, kokono, teo, sukerkano, porko kaj aliaj agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj, kiujn ĝi pagas al la kamparanoj, sed la vendprezoj, kiujn pagas la urbanoj, restas fundamente senŝanĝaj. Samtempe la ŝtato ankoraŭ malaltigis la prezojn de multaj



*Traktoroj produktitaj de la Traktora Fabriko Dongfanghong de Luojang, Henan, atendas transportadon.*

industriaĵoj, precipe tiuj subtenantaj la agrikulturan produkton kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj, kiel kemia sterko, agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj, insekticido, dizeloleo, keroseno kaj petrolgaso.

Ĉar Ĉinio estas socialisma lando ankoraŭ evoluanta, nuntempe la enspezo de la laboristoj kaj oficistoj kaj vivnivelo de la ĉina popolo estas relative malalta. Tamen, dank' al foresto de la inflacio en Ĉinio kaj stabileco de la prezoj kaj garantiiteco de liverado de ĉiutagaj vivbezonaĵoj, la ĉina popolo havas kvietan ekonomian vivon, tio kreis favorajn kondiĉojn por senĉese disvolvi la nacian ekonomion.

Tiu stato de la nova Ĉinio akre kontrastas kun la ripetada inflacio kaj suferplena vivo en la malnova Ĉinio. Tiutempe Kuomintango senbride emisiis papermonon tiel ke la valoro de mono daŭre faladis kaj la prezoj fluge altiĝis. Dum la 12 jaroj de 1937 ĝis la antaŭvespero de la Liberiĝo, la totala emisiita sumo de *fabi* (leĝa mono) de Kuomintango kreskis 140,000,000,000-oble kaj la prezoj de varoj kreskis 8,500,000,000,000-oble. En tiu tempo la longdaŭra inflacio alportis terure pezan suferon al la popolo.

Atesto de altiĝo de la popola vivo en la nova Ĉinio estas stabila kreskado de la ŝpardeponoj de la urba kaj kampara loĝantaro ĉe banko. Ĝis septembro de 1974, la totala sumo de ŝpardeponoj duobliĝis tiun de 1965. Tio montras la plenan fidon de nia popolo al Renminbi.

De longa tempo la valoro de Renminbi restas stabila sen malpliigo kaj sen pliigo. Tia estas ankaŭ ĝia ŝanĝa prezo kun eksterlandaj monoj. Antaŭe, la ekstera komerco kaj aliaj ekonomiaj interrilatoj de nia lando kun aliaj landoj kalkuliĝis ĝenerale en fremda valuto; ekde 1968 komencis esti uzata Renminbi. Kaj nun estas pli ol 60 landoj kaj regionoj kiuj uzas ĝin en ekonomiaj rilatoj kun nia lando. Tio ludas gravan rolon por liberiĝi de ĝenado kaŭzita de financa kaj valuta krizo de kapitalismaj landoj en disvolvo de nia ekstera komerco kaj plivastigo de la eksteraj ekonomiaj interrilatoj laŭ la principo de egalrajto kaj reciproka utilo.

## KIE KUŜAS LA KAŬZO?


Kie kuŝas la kaŭzo ke ne okazis inflacio en la nova Ĉinio?

Kiel konate, la mizereco, subevoluo kaj ripetadaj inflacioj en la malnova Ĉinio estis kaŭzitaj de la agreso kaj prirabado de imperiismoj kaj la longdaŭra reakcia regado de feŭdismo kaj brokrata kapitalismo. Post longdaŭraj revoluciaj bataloj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo renversis la tri grandajn montojn, kiuj pezis sur ĝia kapo, kaj fondis en 1949 la socialisman landon de proleta diktaturo — la Ĉinan Popolan Respublikon. La nova Ĉinio konfiskis la imperiismajn entreprenojn en Ĉinio kaj la burokratan kapitalon. La laborista klaso kaj laboranta popolo fariĝis mastroj de la ŝtato kaj ankaŭ de produktaj rimedoj. La ŝtato disvolvas produktadon cele por kontentigi la bezonojn de la tuta socio sed ne por ĉasi profiton; ankaŭ la mono de la nova Ĉinio ne plu servas kiel rimedo por ekspluati kaj subpremi la laborantan popolon sed servas al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, por plivastigi la interŝanĝon de materialoj inter la urboj kaj la kamparo, por firmigi la aliancon inter la laboristoj kaj kamparanoj kaj por plibonigi paŝo post paŝo la popolan vivon. Tio komplete elradikigis la kaŭzojn de ekonomia krizo kaj la inflacio en Ĉinio.

Nuntempe la serioza financa kaj mona krizo aperinta en kapitalismaj landoj estas ĝuste speguliĝo de pliprofundiĝo de iliaj politika kaj ekonomia krizoj. La produktaj rimedoj en tiuj landoj estas posedataj en la manoj de la monopola burĝaro, kiu por ĉasi maksimuman profiton blinde disvolvas la produkton. Kaj la vivo de la laborularo estis limigita en la plej malalta nivelo, kio kaŭzis senĉesan malleviĝon de ilia aĉetpovo kaj ĉiaman ŝrumpiĝon de la enlanda merkato. Krome pro la leviĝo de la evoluantaj landoj en Azio, Afriko, Latinameriko kaj aliaj regionoj post la Dua Mondmilito, multe reduktiĝis la internacia merkato por la imperiismo.

La nova Ĉinio konfiskis la imperiismajn entreprenojn kaj la burokratan kapitalon kaj firme tenas en siaj manoj la aortojn de la nacia ekonomio kaj tuj poste venke faris la socialisman reformon en posedsistemo de produktaj rimedoj, nome la iom-post-ioma turno de individuaj agrikulturaj kaj metiaj ekonomioj en kolektivajn ekonomiojn tra la vojo de kooperativigo kaj la apliko de la politiko de utiligo, limigo kaj transformado al la industrio kaj komerco de nacia kapitalismo tra diversaj formoj de ŝtata kapitalismo, ekzemple, kuna funkciigo de entreprenoj fare de la ŝtato kaj privatuloj, por paŝo post paŝo turni ilin en ŝtatan ekonomion. La reformo de posedsistemo de produktaj rimedoj estis fundamente plenumita en la jaro 1956. Tiamaniere en Ĉinio, la socialisma publika

*Kemiaj sterkaĵoj transportataj al la kamparo*





*Mondeponado de komunumanoj por subteni la socialisman konstruadon*

posedsistemo anstataŭis la kapitalisman privatan posedsistemon kaj tiel estas eliminita la ekonomia bazo de ekspluato de homo al homo. En Ĉinio ne estas privataj fabrikoj, kultivejoj kaj aliaj entreprenoj, nek libera konkurso. Nun post efektivigo de kelkaj kvinjaraj planoj, la socialisma ekonomia bazo de Ĉinio estas senĉese plifortiĝinta kaj la financoj fariĝis pli firmaj. De pli ol 20 jaroj, Renminbi estas provitaj de la batalo por rezisti la usonan agreson kaj helpi Koreion, de la seriozaj naturkatastrofoj dum tri sinsekvaj jaroj kaj de la senĉesa ĝenado kaj subfosado de la klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj, kaj restas ĉiam stabila.

## FIDINDAJ PAŜOJ

Post sia fondiĝo, la Ĉina Popola Respubliko alprenis serion da paŝoj por elimini la malutilajn sekvojn de la longdaŭra inflacio de la malnova Ĉinio, nome koncentri la administradon de tutlandaj financoj kaj nacia ekonomio, aktive ekvilibrigi la ŝtatajn en- kaj el-spezojn, fortigi la administradon de kontanta mono, anstataŭigi la monon emisiitan de Kuomintango per Renminbi kaj malpermesi la cirkuladon de fremdlandaj monoj en Ĉinio, rigore malebligi la spekuladojn, starigi kaj disvolvi la ŝtatan komercon, unuece mastrumi la materialojn kun graveco por la nacia ekonomio kaj la popola vivo, garantii la provizadon de la merkato. Kaj stariĝis memstara, sendependa, unueca socialisma sistemo de financoj kaj mono.

La longtempa stabileco de Renminbi ŝuldas al la fakto, ke la ŝtato tenas enmane grandan kvanton da varoj kaj uzas ilin por provizi la merkaton laŭ difinitaj prezoj. Ĉar en Ĉinio regas la socialisma publika posedsistemo de produktaj rimedoj, la produktaĵoj de la ŝtataj entreprenoj apartenas al la ŝtato. Kaj la agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj de la komunumoj en la kamparo estas vendataj al la ŝtato laŭ raciaj prezoj post rezervado por propraj uzoj. Ekde la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub direktado de la principo de **"disvolvo de la ekonomio kaj garantio de la provizado"** la industrio kaj agrikulturo senĉese disvolviĝas, tiel ke multe kreskas la produkto-

kvantoj de manĝaĵoj, vestaĵoj, ĉiutagaj bezonaĵoj kaj aliaj varoj. La totalaj sumoj de ŝtata aĉeto kaj podetala vendo de varoj en 1973 kreskis pli ol sesoble kompare kun tiuj en la jaroj tuj post la Liberiĝo. La ŝtata stoko de varoj senĉese kreskas kaj en la fino de junio 1974 la stoko de varoj sub mastrumo de komerca fako preskaŭ duobliĝis kompare kun tiu en la sama periodo en 1965. En Ĉinio ĉiu juano emisiita estas garantiata per varoj en valoro de kelkaj juanoj, tiel ke la cirkulanta mono havas sufiĉan provizon da varoj por garantii sian stabilecon.

Persistado pri la principo de ekvilibrigo de en- kaj el-spezoj en la socialisma konstruado estas grava kondiĉo por stabiligo de la mono. La rezulto de plenumo de la ŝtata budĝeto montriĝis ĝenerale, ke la enspezoj de la ŝtato superas la elspezojn per ioma pozitiva saldo, tiel ke la rezervaj fortoj de la ŝtato estas daŭre plifortigitaj. En okazo de naturaj katastrofoj, la ŝtato klopodas atingi ekvilibron de en- kaj elspezoj per ŝparado kaj pliprodukto kaj per uzo de rezervaj fortoj, nome reguligante la spezojn de malsufiĉa jaro per rezervoj el la abunda, sed absolute ne per pruntprenoj, nek per pliigo de monemisio. Nun Ĉinio estas lando, kiu havas ŝuldon nek enlandan nek eksterlandan. La firmeco kaj ekvilibreco de la financoj en nia lando ebligas la emision de mono en la limoj permesataj de produkta disvolvado kaj plivastigo de cirkulado de varoj, sen apero de senbrida monemisio kaj inflacio, kiel okazas en kapitalismaj landoj.

En la nova Ĉinio Renminbi estas unuece emisiata kaj koncentre kontrolata de la ŝtata banko. Neniu ajn administra distrikto, nek alia instanco rajtas dividi tiun rajton, kaj ĉiaj biloj estas malpermesitaj cirkuli en la merkato. Sekve ĉia spekulacio pri valorpaperoj, troviĝanta en la kapitalisma socio, absolute ne eblas en Ĉinio. La mono emisiita de la ŝtata banko estas revenigata ĉefe per laŭplana provizado de varoj. Ĉiujare, la sumoj de elpagotaj salajroj, de elspezoj por aĉetado de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj el la kamparo kaj pro tio la bezonota kvanto de monemisio kaj tiu de provizotaj varoj estas laŭ dispozicioj de la ŝtata plano, tiel ke oni povas laŭplane emisii kaj revenigi la monon laŭ normalaj kanaloj kaj la normala cirkalado de la mono estas garantiata.

*La komercaj laborantoj de Henghian-gubernio de Guanghi aĉetas anasojn en kamparo por kontentigi la bezonon de merkato.*



*En la Ŝanhaja Unua Magazeno*



LIU KING:

# Impostoj en Ĉinio

IMPOSTO, tiu de ĉiuj konata vorto, havas tute malsamajn signifojn kaj esencojn en landoj kun malsamaj socisistemoj. En Ĉinio, ekzemple, antaŭ la Liberiĝo, la imposto estis rimedo de la reakcia registaro por kruele ekspluati vastan laborantan popolon, kaj post la Liberiĝo la imposto estas kolektita por konstrui la socialismon kaj bonstatigi la tutan laborularon. Do, kia statas la impostokolektado nun en nova Ĉinio?

### NE EKZISTAS PERSONA ENSPEZA IMPOSTO

Ekde la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri malpezigo de ŝarĝo de la popolo, la ŝtato jam abolis la malnovajn multnombrajn tropezajn impostojn kolektitajn antaŭe sub diversaj nomoj kaj starigis tutlandan unuecan impostsistemon. Nuntempe, la ĉefaj impostoj estas la unueca enspeza imposto de industrio kaj komerco, agrikultura imposto kaj imposto por uzpermeso de ŝipoj kaj veturiloj. Kaj la persona enspeza imposto estas abolita jam dekomence.

La ŝtato ne impostas la salajron de urbanoj inkluzive de laboristoj, aktoroj, doktoroj, instruistoj, verkistoj, oficistoj k.a. Oni devas pagi nur imposton por uzado de bicikloj kaj motorveturiloj, kolektatan ĉe registro kaj peto pri permesatesto de ilia uzado ĉe koncerna administracio pri la urbaj trafikoj laŭ la impostleĝo, kun nenia rilato al la persona enspezo. Tiu imposto estas tre malalta, kiel ekzemple en Pekino oni pagas ĉiujare por unu biciklo 2.2 juanojn, kiuj egalas al prezo de 5 kilogramoj da rizo aŭ tiu de 2 metroj da ordinara blanka kotonŝtofo.

En la kamparo, la ŝtato kolektas agrikulturan imposton ĉefe de la popolaj komunumoj kaj de la ŝtataj kultivejoj, sed ne impostas la enspezojn de la komunumanoj ricevitajn en kolektiva laboro kaj iliaj familiaj flankokupaj produktoj.

Dank' al longtempa stabileco de la ĉina mono *Renminbi* kaj senĉesa kreskado de la popola enspezo ĉiam plimultiĝas la ŝparmono deponita de urbanoj kaj vilaĝanoj ĉe bankoj. Sed la ŝtato ankaŭ ne impostas la mondeponantojn el la interezoj ricevitaj de la bankoj.

De kie venas do la financaj rimedoj de la ŝtato? Ĉefe de la profitoj ricevitaj de la ŝtataj entreprenoj. La imposto kolektita el la industrio kaj komerco okupas nur ĉ. trionon de la totala financa enspezo de la ŝtato; el tiu triono pli ol 99% estas kolektitaj el la ŝtataj kaj kolektivaj entreprenoj kaj malpli ol 1% el aliaj flankoj.

Tiu ĉi stato tute kontraŭas al sistemo de la malnova Ĉinio, en kiu la imposto estis peza ŝarĝo por laboruloj. Tiam troviĝis diversformaj enspezaj impostoj, kiel ekzemple, de salajro-honorario, portempa negocprofito, speciala superprofito, luigo kaj vendo de posedaĵoj ktp. Laŭ nekompleta statistiko, la impostoj en la malnova Ĉinio dum la 30-aj jaroj nombris pli ol 1,700 specojn. Oni diris figure: "Impostoj multas kiel bovharoj." La reakcia registaro kruele elpremis sangon-ŝviton de la laboranta popolo

per la kruele pezaj kaj nekalkuleble multformaj impostoj, ĵetante ilin en mizeregan vivon.]

Ĉu la agrikultura imposto pliiĝas ĉiujare, kun grandmezura pliprodukto de agrikulturo en la nova Ĉinio?

## KRESKADAS LA PRODUKTO SED NE LA IMPOSTO DE AGRIKULTURO

La kamparanoj, kiuj okupas la plejparton de la ĉina loĝantaro, estis unu el la ĉefaj objektoj por ekspluatado fare de la reakcia reganta klaso antaŭ la Liberiĝo. Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio estis tuj aplikata la politiko de stabiligo de la kamparana vivo kaj nepliigo de imposto ĉe pliprodukto, laŭ kiu la sumo de agrikultura imposto kolektita de la ŝtato restas senŝanĝa dum certa periodo. Ekzemple, Ĉinio akiris riĉajn rikoltojn en agrikulturo en sinsekvaj jaroj de 1962 ĝis 1973, sed la sumo de agrikultura imposto ĉiam restas sama sen pliigo. Pro tio la relativaj procentoj de la imposto en rilato kun la efektiva produktokvanto malleviĝis jam de 13.2% en la jaro 1952 al malpli ol 6% nun.

La agrikultura imposto de Ĉinio estas kolektata laŭ meznombra jara produktokvanto difinita laŭ la lokaj grundkondiĉoj, ĝenerala mastruma nivelo kaj kutima rikolto dum ordinaraj veterkondiĉoj. La fiksita jara produktokvanto restos senŝanĝa dum certa periodo. Tiel la komunumoj povas pli multe profiti sen adekvata pliigo de impostŝarĝo el la pliprodukto sur difinita kampo dank' al plibonigoj de agrikultura tekniko, mastrumado kaj fundamenta konstruado en la kampoj.

Laŭ la leĝo de la ĉina agrikultura imposto estas difinoj favoraj por disvolvo de agrikultura produkto, ekzemple, dum certa periodo estas liberigo de imposto por nove agrigita tero, redukto aŭ liberigo de imposto estas permesata al tero laŭ la grado de trafita natura katastrofo. Kaj por nacimalplimultaj regionoj kaj montregionoj kie la rikolto estas malalta, la imposto estas malpeza kaj krome estas difinitaj speciale reguloj por redukti aŭ senigi la imposton.

## DU MALSAMAJ IMPOSTSISTEMOJ ESENCE DIFERENCAJ

El supre menciitaj faktoj oni povas vidi, ke la impostokolektado de la nova Ĉinio esence diferencas de tiu de la malnova Ĉinio kaj de kapitalismaj landoj, ĉefe en jenaj punktoj:

1. La imposto en la nova Ĉinio estas kolektita de la popolo kaj uzata ankaŭ por la popolo. Ĝi estas uzata por disvolvi ĉefe industrion kaj agrikulturon kaj duavice kulturan, edukan kaj higienan aferojn k.a. por tiel senĉese levi la materian kaj kulturan vivnivelon de la popolo. Ekzemple, dum la 19 jaroj inter 1953 kaj 1971, la sumo uzita de la ŝtato por helpi akvoutiligan konstruadon, grundreformon, forstumadon, mekanikigon de agrikulturo k.a. en la kamparo, superis per 23% la suman agrikulturan imposton kolektitan dum la sama periodo. Cetere la ŝtato ĉiujare pruntedonas pere de bankoj monon al kamparo por akceli la agrikulturan produkton.

Por plibonigi la popolan vivon kaj favore akceli la disvolvadon de agrikultura produkto, la registaro reduktis sinsekve la prezon de industriaĵoj unuflanke kaj altigis la prezojn por aĉeti agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn aliflanke. Samtempe kun tio la vendprezoj de tiuj produktaĵoj restas stabile neŝanĝitaj en la urboj. La perdojn rezultitajn kovras plene la ŝtato, tiel ke ne nur la komunumoj pliigas sian enspezon, sed ankaŭ la laboristoj, intelektuloj kaj aliaj laboruloj profitas.

En la malnova Ĉinio, la reakcia registaro impostis la popolon ĉefe por vivteni la armeon, policon, justicon, malliberejojn kaj ŝvelajn burokratajn organismojn, kiuj

subpremis la popolon. El la kolektitaj impostoj la sufiĉe granda parto grase nutris la burokratan kaj kompradoran klikojn.

2. En la impostokolektado, la nova Ĉinio plenumas la politikon **"disvolvi la ekonomion kaj garantii la provizadon"**. La ŝtato impostas la ŝtatajn entreprenojn laŭ malsamaj tarifoj difinitaj distinge inter industrio kaj komerco, inter produktaj kaj konsumaj rimedoj kaj impostas la neŝtatajn entreprenojn laŭ la principo bazita sur samtempa konsidero pri la interesoj ŝtataj, kolektivaj kaj individuaj, pli peze tiujn kiuj enspezas pli multe kun pli granda elporteblo, kaj malpli peze tiujn aŭ eĉ liberigas ilin de imposto, kiuj enspezas malmulte.

En la malnova Ĉinio, male, la plejparto el la imposto peze falis sur la vastajn laborulajn amasojn precipe tiujn el la plej malalta socitavolo. Sed burokratoj, kompradoroj, bienuloj kaj kapitalistoj povis elturniĝi el impostopago aŭ transtrudi per diversformaj manovroj al la laboranta popolo la imposton, kiun ili mem devis pagi.

3. La impostoleĝo de la nova Ĉinio estas unueca en la tuta lando. En la kolektado kaj mastrumo de impostoj oni agas kategorie laŭ la koncernaj politikoj. Kiajn impostojn kaj kiel oni kolektas, ĉio estas difinita unuece de la centra registaro. Kaj la konkretaj plenumaj metodoj ellaboritaj de la lokaj instancoj devas esti sankciitaj de aŭ registritaj ĉe la centra registaro, kaj tute malsame ol en la malnova Ĉinio ĉiu loka instanco ne rajtas libervole kolekti impostojn sub ĉia ajn nomo.

Ĉinio estas socialisma lando. Ĉe ĝi la impostokolekto karakteriziĝas ankaŭ per tio, ke la interesoj de la impostkolektantoj kaj impostopagantoj estas unuecaj. Kiel supre jam dirite, la ŝtato kolektas impostojn por konstrui la socialismon kaj bonstatigi la tutan laborularon, tial la impostopagantoj rigardas aktivan pagon al la ŝtato kiel sian gloran devon.



ĈEN FANG:

# Solvo de ... Nova

En la malnova Ĉinio, pro la invado de imperiismo kaj reakcia regado de Kuomintango, la senlaboreco grave turmentis la laboristojn. Tiam la fremdlandaj varoj inundis nian merkaton, kaj la naciaj industrioj kaj komerco malprospere vegetis, tiel ke multaj fabrikoj kaj entreprenoj bankrotis aŭ reduktis la personaron. La laboristoj estis senrajtaj en pozicio de sklavigiteco. La mastroj povis maldungi ilin en ĉiu ajn tempo, kaj iliaj profesioj ne estis garantiitaj. Iuj fabrikoj eĉ grandnombre dungis infan-laboristojn, malfavore al laborŝanco al plenaĝuloj. En la kamparo, la ekspluatado de



# Senlaboreco en Ĉinio

terrento kaj uzuro estis tre peza. Okaze de naturaj katastrofoj de akvego aŭ sekeco malriĉaj kamparanoj ne povis vivteni sin kaj grandnombre ensvarmis en la urbojn, pliigante tie la senlaborecon. Multaj studentoj ne povis trovi laboron post finstudo en altaj lernejoj. Laŭ la statistiko post la Liberiĝo en 1949, la urbaj senlaboraj laboristoj kaj intelektuloj kune superis 4,000,000 en la tuta lando.

Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio, Prezidanto Maŭ Zedong jam montris al ni: **"La problemo de senlaboreco, t.e., de nutrado, en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj estas rezulto sole de la kruelaj kaj senkoraj subpremado kaj ekspluatado de imperiismo, feŭdismo, burokrata kapitalismo kaj la reakcia registaro de Kuomintango. Sub la popola registaro, la problemo de senlaboreco, t.e., de nutrado, povos esti plene solvita post nur kelkaj jaroj, same kiel en norda kaj nordorienta Ĉinio."** (Norda kaj nordorienta Ĉinio estis liberigita pli frue. —*La Red.*)

Efektive estis tiel. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro tuj komencis restarigi kaj disvolvi la produkton. La ŝtato sinsekve fondis diversajn ŝtatajn entreprenojn, investante ilin per kapitalo. Samtempe, ĝi konfiskis ĉiujn entreprenojn, kiuj apartenis antaŭe al imperiismo kaj burokrata kapitalismo de Kuomintango, kaj faris al ili necesajn kunordigojn kaj plivastigojn. Al ĉiuj privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj de nacia kapitalo, kiuj estis utilaj por la ŝtato kaj popolo, estis allasitaj por paŝopostpaŝe reformitaj sub la gvido de la nacia ekonomio. Ili poste fariĝis entreprenoj kune funkciigataj de la ŝtato kaj privatuloj, al kiuj la ŝtato investis kapitalojn por plivastigi la produkton. La privataj entre-



Maldekstre: *Tibetana laboristino Nini (la dekstra) de Linĝi-a Lanŝpinejo de Tibeto*

*La junaj kaj maljunaj laboristinoj de la Ĝenggoŭ-a Dua Koton-ŝpinteksejo helpas unu la alian por kuna progreso.*



*Seriozan diskutadon faras la laboristoj de la grupo por studi marksismon kaj leninismon de la Ĝenerala Aglomerejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio.*

prenistoj longe ricevis de ili dum certa periodo fiksitajn procentojn laŭ siaj originaj kapitaloj.

Kun restarigo kaj disvolvo de la produkto, la popola registaro solvis paŝon post paŝo la problemon de enokupiĝo de la senlaboruloj. Al tiuj, kiuj havis kondiĉojn por labori, la registaro asignis konvenajn laborojn. Kaj por tiuj, kiuj ne havis necesajn edukitecon kaj profesian lertecon, la ŝtato fondis diversajn trejnajn kursojn, havigante al ili profesian kapablon. Por tiuj, kiujn laborigi estis provizore neeble, la popola registaro asignis kapitalon por fondi produktajn organizojn kun karaktero de kolektiva posedo aŭ movis ilin al partopreno de konstruaj laboroj de la urboj, kaj poste laŭgrade akceptis ilin kiel laboristojn kaj oficistojn de la ŝtato. Rilate al tiuj, kiuj estis propre kamparanoj venintaj en urbojn antaŭ la Liberiĝo, kaj kiuj havis kondiĉojn por iri labori en la kamparo, la ŝtato mobilizis ilin al vilaĝo por tie partopreni laboron. La popola registaro krome donis certajn materiajn helpojn al tiuj, kiuj provizore ne povis ricevi laboron kaj havis malfacilojn en vivtenado. Dume, la popola registaro praktikis la politikon de "kompleta akcepto" al la kelkmiliona dungitaro de la antaŭaj registaraj kaj edukaj institucioj de la faligita reĝimo, asignante al ili konvenajn laborojn, kaj samtempe malpermesis al la privataj entreprenoj liberajn maldungojn.

La starigo de nia socialisma sistemo forigis la radikon de la senlaboreco. Kun la fundamenta plenumo de socialisma reformado al la posedsistemo de produktaj rimedoj en nia lando, la produkto de industrio kaj agrikulturo estas suririgita sur la relojn de la ŝtata plano, kaj tio formis potencan bazon por solvi la problemon de laborhavigo al la popolo. En la kamparo, la individuaj kamparanoj unue organiziĝis en agrikulturajn produktajn kooperativojn kaj poste en la jaro 1958 en popolajn komunumojn. Dank' al samtempa disvolvado de agrikul-

turo, forstumado, brutbredado, flankokupoj kaj fiŝado, ĉiam pli vasta kreskado de fundamenta konstruado en agrikulturo kaj paŝopostpaŝa progreso de la mekanikigo de agrikulturo, ne nur malaperis superfluaj laborfortoj, sed ankaŭ bezonata estis subteno de teknikaj laboristoj kaj intelektaj junuloj el urboj. En la urboj, kun la disvolviĝo de industrio, ne nur la senlaboruloj postlasitaj de la malnova socio antaŭ la Liberiĝo estis plene okupitaj, sed ankaŭ estas laborigitaj grandnombraj dommastrinoj, kiuj antaŭe okupis sin nur pri hejmaj aferoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la finstudintoj de diversaj lernejoj en urboj ne bezonas mem serĉi okupojn. La ŝtato laŭplane edukas junulojn per mezgradaj teknikaj lernejoj kaj universitatoj, el kiuj la finstudintojn la ŝtato rekte kaj unuece sendas laŭ la plano al diversaj branĉoj de nacia ekonomio por tie labori super produkta tekniko aŭ scienca esplorado k.a. La finstudintoj de mezlernejoj estas senditaj laŭ la bezonoj de la ŝtato por labori en fabrikoj, kamparo aŭ kulturaj, edukaj kaj higienaj institucioj. Post hardado kaj provado en praktiko de laboro, iuj el ili estas elektataj por plue studi en altaj lernejoj. Do ne estas problemo de senlaboreco por junuloj.

En nia lando la okupiteco de laboristoj kaj oficistoj estas sekura. Laboristoj kaj oficistoj elŝparitaj de renovigo de ekipaĵoj, reformo de teknologio kaj plibonigo de labor-organizado en fabrikoj kaj minejoj estas transpostenigataj al aliaj entreprenoj nove fonditaj aŭ plivastigitaj laŭ unueca plano de la ŝtato. Dum la tempo de transpostenigo, ili ricevas la kutiman salajron. La laboristoj kaj oficistoj ĝuas la asekuron laŭ la regularoj difinitaj de la ŝtato, kiam ili fariĝas nelaborkapablaj pro maljuneco, malsano aŭ kripliĝo. Atinginte difinitan aĝon de emeritiĝo, ili ricevas pension, kiu egalas 50-80 % de la origina salajro.

Al la vivo kaj okupiĝo de blinduloj, mutuloj, surduloj kaj aliaj kripluloj la popola registaro same donas prizorgojn de kuracado, klerigado kaj fondo de fabrikoj, kiuj bezonas laborfortojn konformajn al iliaj fiziologiaj kondiĉoj, por ke ili partoprenu produkton kaj laboron laŭ sia kapablo. Por ĉiuj, kiuj tute perdis laborkapablon, estas fonditaj specialaj prizorgaj institutoj kaj domoj de maljunuloj financitaj de la ŝtato.



*Gebarbiroj de Gujlin-a Barbirejo Kisan en laboro*


# Grena Memsufiĉo de Hebej, Ŝandong kaj Henan

DUM 25 jaroj depost la fondiĝo de la nova Ĉinio multe ŝanĝiĝis la fizionomio de agrikultura produkto de la provincoj Hebej, Ŝandong kaj Henan, kiuj historie ĉiam havis malaltan produkton sub oftaj atakoj de naturaj katastrofoj. Tiuj provincoj, al kiuj serioze mankis greno en la pasinteco, nun produktas grenon plimulte ol memsufiĉe. Tio estas historia turniĝo kaj evento kun politika kaj ekonomia signifo en nia lando.

## I

La tri provincoj situas en basenoj de la Flava Rivero, Huajhe kaj Hajhe kaj historie suferis alterne katastrofojn de sekeco kaj inundo. Tie agrikultura produkto estis tre malalta. En la pasinteco, por sekurigi sian reakcian regadon kaj kontentigi la konsumon de siaj burokrataj organoj kaj trupoj, la feŭdaj dinastioj devis rabi grandajn kvantojn da greno de la sudo de nia lando kaj transportis ĝin norden. Sole dum King-dinastio (1644-1911), ekzemple, ĉiujare la greno transportita de sudo al nordo superis 200 mil tunojn. Dum la reakcia regado de Kuomintango, agrikultura produkto suferis pli seriozan detruon, tial tre grave mankis greno al tiuj tri provincoj. Laŭ nekompleta statistiko, dum la jaroj 1931-1933, sole la provinco Hebej importis el aliaj provincoj kaj eksterlando tritikon kaj farunon en totala kvanto de miliono da tunoj, por provizi la ĉefajn urbojn. En la kamparo grenmanko estis ankoraŭ pli serioza kaj la vasta kamparanaro ĉiam troviĝis en stato de malsato.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio tre zorgas



*Sur draŝejo*

pri la malfacila vivo de la popolo en la tri provincoj. Prezidanto Maŭ multfoje inspektis tiujn provincojn kaj sinsekve donis la grandajn instrukciojn **"nepre jungu Huajhe-riveron", "bone aranĝu la Flavan Riveron"** kaj **"nepre jungu radikale Hajhe-riveron".** De pli ol 20 jaroj, sub direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, sinapogante sur la forto de la socialisma kolektiva ekonomio, la popolo de la tri provincoj streĉis plene la energion kaj obstine batalis kontraŭ seriozaj naturaj katastrofoj. En vintro kaj printempo de ĉiu jaro kelkdek milionoj da homoj batalis sur la laborejoj por kampaj kaj akvoutiligaj konstruaĵoj,spite al frostaj ventoj kaj neĝadoj. Ili okupis sin por enordigi la Flavan Riveron kaj ŝanĝis ĝian malnovan staton de du breĉiĝoj en tri jaroj, kiel okazis antaŭ la Liberiĝo. En basenoj de Huajhe kaj Hajhe ili nove fosis aŭ dragis milojn da riverlitoj grandaj kaj malgrandaj. Dank' al tio preskaŭ 7 milionoj da hektaroj da facile inundeblaj areoj estas liberigitaj de la minaco de inundo kaj akvostagno. Samtempe, ili entreprenis agrikulturan fundamentan konstruadon kun la celo preventi trosekecon kiel centra tasko. En la montregiono de supra baseno de riveroj ili konstruis akvokonservejojn, ŝtuparkampojn kaj kulturis forstojn por reteni akvon kaj grundon; en la ebenaĵa regiono ili fosis putojn kaj kanalojn kaj reformis alkalan grundon por plibonigi la kondiĉojn de agrikultura produkto, tiel ke la fizionomio de la kamparo senĉese ŝanĝiĝis. En la jaro 1970, la tri provincoj jam fundamente



*Gvidantaj kadroj de Ŝengĝuang-komunumo de Taj-an-gubernio, Ŝandong, kune kun komunumanoj en falĉado de tritiko*

realigis grenan memsufiĉon. En la jaro 1973, ilia totala produktokvanto de greno kreis la plej altan rekordon en la historio. En tiu jaro, post reteno de sufiĉa kvanto da greno por kamparana konsumo, semoj, brutbredado kaj kolektiva rezervo kaj por garantii provizon al urbaj loĝantaroj, ili ankoraŭ liveris pli ol duonmilionon da tunoj da greno al la ŝtato. De tiam, jam efektiviĝis la delonga sopiro al grena memsufiĉo de la tri provincoj. Tio plene montris la superecon de la socialisma sistemo de nia lando.

La tri provincoj estas unu el niaj ĉefaj ekonomiaj regionoj. La rapideco de la agrikultura disvolviĝo kaj grena memsufiĉo de tiu regiono havas grandan influon al disvolviĝo de la nacia ekonomio de nia lando. Antaŭ tio, la ŝtato ĉiujare devis provizi la katastrofitajn areojn de tiuj tri provincoj per greno el sudo. Nun tiu stato jam multe ŝanĝiĝis. En la lastaj jaroj, la grena produktokvanto de la tri provincoj senĉese kreskis; iliaj forsta, paŝta, flankokupa kaj fiŝista aferoj kaj kulturo de



*Intelektaj gejunuloj de Guĉeng-komunumo, Henan, resumas spertojn pri alta produkto de rizo.*

ekonomiaj plantoj plenamplekse disvolviĝis. Grenaj rezervoj de la ŝtato, komunumoj kaj brigadoj rimarkinde kreskis. Pliprodukto de greno povas ne nur subteni la konstruadon de industrio, sed ankaŭ levi paŝon post paŝo vivnivelon de la popolo. En okazo de katastrofo la provincoj en si mem povas provizi la grenmankajn lokojn per superflua parto de aliaj lokoj. Kaj en eventuala milito, oni povos solvi ĉeloke la problemon de greno por la trupoj kaj loĝantoj. La grandaj strategiaj principoj de Prezidanto Maŭ "**Sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**" kaj "**vaste akumuli rezervgrenon**" estas paŝon post paŝo realigitaj.

## II

La grena memsufiĉo de la tri provincoj estas venko de proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj frukto de la Granda Proleta Kultura Revolucio. En la 17 jaroj antaŭ la kultura revolucio, la tri provincoj sume pliproduktis kune 13.5 milionojn da tunoj da greno, meznombre ĉ. 800 mil tunojn ĉiujare. En la ok jaroj post 1965, ili sume pliproduktis 16.7 milionojn da tunoj da greno, meznombre pli ol 2 milionojn ĉiujare. La kvanto de pliproduktita greno en la ok jaroj preskaŭ egalas al la totala produktokvanto de la tri provincoj en 1949.

La disvolviĝado de agrikulturo de la tri provincoj estas plena de akraj bataloj. De agrikultura kooperativigo ĝis la fondo de popolaj komunumoj en la jaro 1958, sekvante la socialisman direkton montritan de Prezidanto Maŭ, la popolo de la tri provincoj streĉis plene la energion por disvolvi la agrikulturon, tial la grena produktokvanto rapide kreskis. Sed, dum la periodo de provizora malfacilo de la nacia ekonomio, Liu Ŝaŭki kaj lia kompanio energie antaŭenpuŝis reviziisman linion. Pretekstante disvolvi la aktivecon de komunumanoj, ili disponigis teron al familioj de komunumanoj kun fiksita produkta kvoto bazita sur familia mastrumado kaj malfermis liberan merkaton por logi la komunumanojn de agrikulturo al komercado, kio akcelis la kapitalisman tendencon en la kamparo kaj repuŝis la socialisman aktivecon de la popolo de la tri provincoj en disvolvo de agrikultura produkto.

Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, precipe en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la popolo de la tri provincoj profunde kritikas la reviziismajn liniojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, plue

altigas sian socialisman konscion kaj disvolvas grandskalan movadon por lerni de Daĝaj en agrikulturo. Prenante Daĝaj-brigadon kaj Hijang-gubernion kiel ekzemplojn, la vastaj kadraro kaj komunumanaro serioze plenumas la proletajn revolucian linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ, kritikas kapitalisman tendencon kaj klopodas disvolvi la socialisman kolektivan ekonomion. En la tri provincoj aperis miloj kaj miloj da avangardaj unuoj en lernado de Daĝaj.

De la lastaj jaroj, la diversnivelaj partiaj komitatoj de la tri provincoj pli konscie praktikas la ĝeneralan principon de disvolvo de nacia ekonomio **"preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron"**, ĝuste traktas la rilatojn inter agrikulturo, malpeza kaj peza industrioj, metas la disvolvon de agrikulturo en gravan lokon, sendas grandajn nombrojn da kadroj al kaj uzas plejparton de rezervitaj rimedoj sur la agrikultura fronto kaj energie organizas la fortojn de diversaj profesioj en plenkora servo al agrikulturo. En la jaro 1973, 70.5% de rezervitaj monrimedoj de Hebej-provinco kaj pli ol 80% de tiuj de subprovinca kaj gubernia niveloj en diversaj lokoj estis uzitaj en agrikultura produkto.

Pli ol mil malgrandaj lokaj industrioj de fero-ŝtalo, karbo, cemento, elektro, kemisterko k.a. fonditaj dum la Granda Proleta Kultura Revolucio ludis gravan rolon en akcelado de agrikultura disvolviĝo. Vizaĝe al la akvomanko en multaj lokoj, la tri provincoj prenis fabrikadon de akvolevaj kaj kontraŭsekecaj ekipaĵoj kiel direkton de la industrio en subtenado al agrikulturo. En la lastaj jaroj, la jara produktokvanto de dizeloj de la tri provincoj grandmezure plimultiĝis, kaj rapide plivastiĝis la areoj irigaciataj per mekanikigitaj putoj. La kamparo estas provizita ankaŭ per grandaj nombroj da traktoroj kaj aliaj agrikulturaj instrumentoj, kaj tiel oni plirapidigis la mekanikigon de la agrikulturo en la tri provincoj kaj kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi agrikulturon multe, rapide, bone kaj ekonomie.

## III

Kuraĝigate de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ pri **"ŝanĝo de la situacio de transporto de greno de sudo al nordo"**, la popolo de la tri provincoj elmontris ekstreme altan socialisman aktivecon kaj grandan forton en batalo kontraŭ naturaj katastrofoj kaj en disvolvado de agrikultura produkto. Prenante Daĝaj kiel ekzemplon, ili firme iras sur la socialisma vojo, sinapogante sur la propraj fortoj kaj luktante en malfacilaj kondiĉoj, vaste entreprenas fundamentajn konstruaĵojn sur la kamparo, energie disvolvas kaj solidigas la kolektivan

*Riĉa rikolto de tritiko akirita de la popolanoj en Ŝigiaĝuang, Hebej, post venko super sekeco.*



ekonomion de la popola komunumo. La regionoj, kiuj havas kompare pli bonajn kondiĉojn, efektivigis ĉiam pli altan produkton kaj liveris pli kaj pli multe da komerca greno al la ŝtato; el la regionoj, kiuj ofte suferis naturajn katastrofojn kaj havis malaltan produkton, iuj realigis grenan memsufiĉon, kaj aliaj ekhavis superfluan grenon, ŝanĝante sian postiĝintan fizionomion.

La subprovinco Hengŝuj en la baseno de Hejlonggang estas la loko, kiu plej serioze suferis naturajn katastrofojn kaj havis plej malaltan produktokvanton en Hebej-provinco en la pasinteco. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, diversnivelaj partikomitatoj de la regiono aktive gvidis la amasojn por ordigi la riveron Hajhe, konstrui mekanikigitajn putojn, reformi salajn kaj alkalajn kampojn. Dank' al tio, ĝi rapide disvolvis agrikulturan produktadon kaj nun havis jam superfluan grenon post rezervo por memprovizo.

En la gubernio Jutaj ĉe okcidenta bordo de la granda kanalo liganta Pekinon kaj Hangĝoŭ de Ĝegiang-provinco, ĉe okazo de inundo antaŭ la Liberiĝo, la kamparanoj ĉiam devis fuĝi aliloken kun maljunuloj kaj infanoj. Antaŭ la kultura revolucio, ĝia agrikultura produkto disvolviĝis malrapide. Dum la kultura revolucio, disvolviĝis arde en ĝi la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo. La komunumanoj diris: "Se Daĝaj-anoj povas reformi siajn dezertan valon kaj kalvan monteton, kial ni ne povas ŝanĝi nian Jutaj?" En printempo de 1971, la sekretario de gubernia komitato de la Partio kun instituciaj oficistoj venis al la bazaj unuoj por helpi la funkciulojn de komunumo kaj brigado bone plenumi iliajn taskojn. Tie ili luktis en malfacilaj kondiĉoj kaj reformis la grundon kune kun la komunumanoj. En la lastaj kvar jaroj, la pomua kaj totala produktokvantoj de greno de la tuta gubernio kreskis per pli ol 1.5-oblo, kaj ĝia greno vendita al la ŝtato atingis cent mil tunojn.

La areo de Juanjang, Jangin kaj Fengkiu de Henan-provinco situas en malnova lito de la Flava Rivero. En la pasinteco granda parto de tiu areo konsistis el sablaj montetoj kaj salalkalaj malaltejoj kun sterila grundo facile atakata de sekeco kaj akvostagno. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio, la popolo de la tri gubernioj obstine batalis kontraŭ inundo, salalkalo, sablovento, sekeco kaj aliaj naturaj katastrofoj. Precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, kun pli granda energio, ili dragis riverojn, konstruis kanalojn, drenis inundon, eliminis alkalon kaj forstumis por bari sabloventon. En printempo de 1974, la sekretario de la gubernia partia komitato de Juanjang kondukis pli ol 300 kadrojn kaj 70,000 komunumanojn kampadi en riverborda etendaĵo de la Flava Rivero. Ili fosis la frostan teron per pioĉoj kaj ŝpatoj por konduki la riverakvon al malaltejoj kaj sedimentigi ilin en bonajn kampojn. En la lastaj jaroj, la grena produktokvanto de la tri gubernioj jaron post jaro kreskis. En la jaro 1973, ili ne nur realigis grenan memsufiĉon, sed ankaŭ liveris pli ol kvindek mil tunojn da komerca greno al la ŝtato. En 1974, la tri gubernioj ree akiris riĉan rikolton. Ĝuste kiam ili aktive liveris impostan kaj komercan grenon al la ŝtato, venis al ili ĝojiga novaĵo, ke la ŝtato transigos ilian grenon al Pekino. Tio signifis ke tiu malnova regiono unuafoje liveros grenon al la ĉefurbo. Pro tio la kadroj kaj amasoj tre emociiĝis. Oni nokte inspektis la grenajn tenejojn, komparis kaj ekzamenis la kvaliton de la liverota greno. Dum la tagoj de transportado de greno, diversspecaj ĉaroj kaj veturiloj plene ŝarĝitaj kolektiĝis kaj kuris al grenaj kolektejoj. Multe da maljunaj malriĉkamparanoj emocie diris: Ni tri gubernioj antaŭe ĉiam manĝis grenon el la aliaj 20 provincoj, nun fine venis nia vico por kontribui al la ŝtato kaj ni portu nian plej bonan grenon al Pekino por ke Prezidanto Maŭ kaj la ĉefurba popolo sciu ke hodiaŭ nia loko jam ne plu estas malnova katastrofata regiono.

HIAŬ HJUEŜENG:

# Familio de Ordinara Laboristo

IUTAGE de komenca vintro, mi vizitis la hejmon de Giaŭ Ĝenje, maljuna laboristo de la Pekina Jili-manĝaĵofabriko. Ĝi estas familio de unu el ĉinaj ordinaraj laboristoj.

Lia familio loĝas en ordinara domo de pekina tipo proksime de la fabriko. La domo konsistas el tri ĉambroj, kiuj ne estas tiom grandaj sed tre puraj kaj ordaj. En tiu tago, ankaŭ la gefiloj de majstro Giaŭ, kiuj laboras en fabrikoj, ripozis, kio aldonis apartan viglecon al la hejmo. La mastrino regalis min per infuzita teo kaj bombonoj alportitaj de ŝia filino Hiulian. Majstro Giaŭ diris al mi ekscitite: "Mi laboris en la manĝaĵofabriko dekojn da jaroj, mia familio tamen neniam aĉetis bombonon antaŭ la Liberiĝo pro malriĉeco."


"Laŭ via parolo, vi eble ne estas lokano?"

"Mia hejmloko estas Ŝandong-provinco, mia origina parolmaniero estas malfacile ŝanĝebla!"


Poste, li ekrakontis pri sia travivaĵo. En la jaro 1936, kiam li estis 27-jara, okazis katastrofo en lia hejmloko. Ne povinte sin vivteni, li migris al Ŝanhajo kaj tie fariĝis laboristo de iu manĝaĵofabriko. Tiu tempo estis suferplena! Okupo estis malfacile trovebla kaj sengarantiata, la mastro povis eksigi laboristojn laŭvole. Dum la 13 jaroj, li laboris sinsekve en tri tiaj fabrikoj. Nur post la Liberiĝo, majstro Giaŭ ekhavis fiksan laborpostenon. Post nelonge, li translokiĝis en Pekinon kune kun Jili-manĝaĵofabriko. Ĉe tio li ekĝojiĝis



*Familianoj de majstro Giaŭ*



*Majstro Giaŭ en laborejo*



*La dua filino Hiulian*

kaj daŭrigis: "Je la komenco, nia fabriko havis nur unu laborejon kaj 48 laboristojn kaj malmulte produktis. Tiam nur unu trirada platĉaro jam sufiĉis ĉiutage por forporti ĝiajn produktaĵojn. Dank' al la zorgado kaj helpado de la Partio kaj la ŝtato, la fabriko pli kaj pli grandiĝis dum la lastaj pli ol dudek jaroj. Nun ĝi jam havas kvar laborejojn kaj pli ol 1,400 laboristojn kaj oficistojn, kaj ĝia produktokvanto jam plimultiĝis je pli-ol-200-oblo kompare kun tiu siatempe. Sed, la produktaĵoj transportataj per dekkelkaj ŝarĝaŭtoj ĉiutage ne povas kontentigi la merkaton pro senĉesa altiĝo de la aĉetpovo de la popolanoj." Post iom da paŭzo li diris daŭre: "Dum la lastaj jaroj, la ŝtato plurfoje reguligis la salajron al laboristoj. Nun mi havas monatan enspezon de 103 juanoj. Pliboniĝis nia vivo, sed pli grave ni fariĝis mastroj de la ŝtato. Preskaŭ ĉiuj kadroj de niaj laborejoj kaj fabriko estas promociitaj el laboristoj. En la jaro 1954, mi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, kaj nun mi funkcias kiel membro de la revolucia komitato de la fabriko. Ankaŭ miaj du filoj membriĝis al la Partio."


Majstro Giaŭ havas kvar gefilojn. Lia plejaĝa filo Puŝeng estas laboristo kvinagrada kaj estro de produkta grupo de bombona laborejo de la nomita fabriko. Li ĉiumonate ricevas salajron de 61 juanoj, kaj lia edzino laboras en la fabriko funkciigata de familianoj de Jili-manĝaĵofabriko kaj estas monate salajrata je 35 juanoj. Ilia propra hejmo troviĝas nemalproksime de la patra. En ordinaraj tagoj, ili laboras en fabrikoj, iliaj du pliaĝaj filoj vizitas lernejojn kaj la plej juna estas zorgata de sia avino. Lia dua filo Futang kaj malpliaĝa filino Hiulian vivas kune kun siaj gepatroj. Futang finis sian lernadon en teknika mezlernejo kaj nun kiel triagrada laboristo laboras en la Pekina Fabriko de Metalurgiaj Maŝinoj, kun monata salajro de 49 juanoj. Hiulian origine estis laboristino pri elektronikaj aparatoj kaj lastatempe estas promociita kiel vicestrino de sia laborejo. Lia pliaĝa filino laboras en iu instituto de alia loko.

Je tio, la mastrino intermetis ridante: "En nia familio iuj laboras, aliaj lernas kaj ankaŭ mi estas okupata!"


Jes, en la nuna Ĉinio ĉiuj laborkapablaj homoj havas sian laborpostenon. Ekzemple en Pekino la enokupiĝa nombro plimultiĝis je 12-oblo dum la 25 jaroj post la Liberiĝo.

Senĉese plimultiĝas la enspezo de la familio de majstro Giaŭ, dank' al la partopreno de gefiloj en laboro. Kiom da monsumoj ili devas elspezi por teni fundamentan vivon en unu monato?

Ĉisube estas la kalkuloj faritaj de ili al mi. La monata luprezo de loĝejo estas 2.36 juanoj, kiuj okupas 1.3 pocentojn de la totala enspezo de li, Futang kaj Hiulian. Pli bona estas la loĝejo de Puŝeng, tial li devas pagi monate 4.05 juanojn, kiuj okupas 4.2 pocentojn de la enspezo de la geedzoj. La pago por akvouzo ĉiumonate ne superas 0.1 juanon po homo, kaj ĉiu kWh. de elektro kostas 0.165 juanon. Por lernado de la du filoj, Puŝeng ĉiusemestre devas pagi 5 juanojn al la mezlernejo kaj 2.5 juanojn al la elementa lernejo. Dank' al la politiko efektivigata de la popola registaro pri malaltaj kaj stabilaj prezoj al fundamentaj vivbezonaj materialoj de la popolo kiel greno, legomo, viando,



*La pliaĝa filo Puŝeng*



*La dua filo Futang*

fiŝo, ovo k.a., ili pagas nur 13-14 juanojn po homo ĉiumonate.

La mastrino ĝoje diris: "Ĉio ĉi tio ŝuldas al la bona gvidado de Prezidanto Maŭ! Nun nia familio maltrankviliĝas nek pri nutrado nek pri vestado, kaj ankaŭ havas deponitan monon ĉiumonate. Antaŭ la Liberiĝo, ni ne povis nin satigi por ne paroli pri mondeponado."

Ankoraŭ klara restas en la memoro de majstro Giaŭ tio, ke lia salajro akirita per peniga laboro siatempe povis plejmulte aĉeti nur 5-6 *doŭ*-ojn da rizo (unu *doŭ* da rizo egalas al 7-8 kilogramoj da rizo). Kaj la lupago de ilia malgranda loĝejo eĉ sen fenestro estis ĉiumonate du *doŭ*-oj da rizo, preskaŭ duono de lia enspezo. El tio oni povas imagi la malfacilecon de lia familio. Tiam ili devis ofte pruntepreni de parencoj. Ju pli ili pruntepreni, des pli ilia ŝuldo multiĝis. Kaj la ŝuldoj estis pagitaj nur post la Liberiĝo. La familio de majstro Giaŭ estis nur miniaturo de sennombraj malriĉaj familioj en la malnova Ĉinio. Tiam la kuomintanga reakcia registaro senbride emisiis monbiletojn, kio kaŭzis leviĝon de varprezoj plurfoje en unu tago. Neniu scias, kiom da laborantaj popolanoj baraktis siatempe sur la malsata kaj morta linio!

Nun, jam forpasis por ĉiam la malfacilaj tagoj. La vasta amaso de laboruloj ne nur havas laboron, sed ankaŭ ĝenerale ĝuas laboran asekuron kaj bonstatigon. Malsanaj laboristoj kaj oficistoj ricevas senpagan kuracadon kaj ankaŭ havas salajron dum malsanado. Emerito ricevadas pension. Ĉiuvintre, la ŝtato elspezas por varmigo de laboristoj kaj oficistoj. Kaj la duono de kuracpago de iliaj familianoj estas pagata de la fabriko. Ĉio ĉi tio estas favoro de la socialisma sistemo al la laboristoj.

Je adiaŭo, mi diris al majstro Giaŭ: "Vi jam aĝas pli ol 60 jarojn kaj estas tempo por ĝui emeritecon." Tamen la lasta diris ridante: "Ankoraŭ fortika mi estas kaj malpeza estas la laboro asignita al mi en la fabriko. Mi ankoraŭ povas kontribui al la socialisma patrolando per miaj produktaj spertoj akumulitaj dum pli ol tridek jaroj."



# Okulfrapa Kontrasto

Du simplaj statistikoj faritaj de la ĉinaj ekonomiistoj klarigos al ni jene:

**1.** Renminbi de la nova Ĉinio havas stabilan aĉetpovon. Per 15 juanoj oni povas aĉeti:

| Varspecoj | en 1952 | en 1974 |
|---|---|---|
| rizo | 12.5 kg. | 12.5 kg. |
| faruno | 5 kg. | 5 kg. |
| salo | 0.5 kg. | 0.5 kg. |
| sukero | 0.5 kg. | 0.5 kg. |
| ŝtofo | 3.33 m. | 3.33 m. |
| alumeto | 2 skatolojn | 2 skatolojn |
| sapo | 2 brikojn | 2 brikojn |
| karbo | 25 kg. | 25 kg. |
| keroseno | 1.25 kg. | 1.25 kg. |
| penicilino | 1 ampolon | 1 ampolon |
| emajla kuveto | 1 | 1 |
| ovo | — | 0.5 kg. |

**2.** En la malnova Ĉinio la monbileto senĉese devalutiĝis. Per 100 juanoj de *fabi* de Kuomintango oni povis aĉeti:

| | | |
|---|---|---|
| En | 1937 | 2 bovojn |
| | 1939 | 1 bovon |
| | 1941 | 1 porkon |
| | 1942 | 1 ŝinkon |
| | 1943 | 1 kokon |
| | 1945 | 1 fiŝon |
| | 1946 | 1 ovon |
| | 1948 | 3 rizgrajnojn |




### 160,000 NOVAJ STUDENTOJ

Serioze praktikante la instrukcion de Prezidanto Maŭ "**elekti studentojn el laboristoj kaj kamparanoj kiuj havas praktikajn spertojn**" kaj plie reformante la malnovan sistemon de varbado de studentoj, niaj altlernejoj en 1974 akceptis pli ol 167,000 novajn laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn. En varbado de novaj studentoj oni prezentis orientilon, principojn, kondiĉojn, metodojn kaj nombrojn de la varbado al amasoj por ke la lastaj ekzamenu junulojn sin anoncantajn por viziti altlernejojn pri iliaj politika konduto, praktika sperto, klereco kaj sanstato, tiel ke la junuloj ricevis edukon pri ideologia kaj politika linioj kaj komprenis signifon kaj taskon de sia vizito al altlernejoj.


Inter tiuj novaj studentoj multaj estis aktivuloj en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj en produktado de siaj propraj unuoj. La nombro de studentinoj plimultiĝis je 8% kompare kun tiu de 1973. Inter ili troviĝas ankaŭ nombro da junuloj de nacimalplimultoj kaj transmaraj ĉinoj.

# Brila Perlo sur la Flava Rivero


EN la supra baseno de la Flava Rivero je pli ol 100 kilometroj fore de Lanĝoŭ, la ĉefurbo de Gansu-provinco de nia lando, staras grandioza digo, kiu baras la torenton de la rivero en profunda ravino. Jen la riverakvo torentas laŭ homa volo en hidroelektrejon, kiu produktas fortan kurenton.

Tio estas nove konstruita hidroelektrejo Liugiahia, la plej granda nuntempe sur la Flava Rivero.

Kiel la dua granda rivero de nia lando, la Flava Rivero havas riĉan akvofonton. Ĝiaj supra kaj meza basenoj kun multe da ravinoj kaj granda natura fal-distanco estas bonaj lokoj por konstrui hidroelektrajn staciojn. Sed en longa tempo de la malnova Ĉinio, pro putra reĝimo kaj senkapableco de reakcia regantaro oni neniam konstruis digon sur la Flava Rivero. Tial riĉa akvofonto vane fluis orienten en la maron, kaj en sezono de pluvego ĝi ofte inundiĝis kaj portis al la popolo katastrofon.



*Veldado*



*La ĉefa digo*

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la socialisma sistemo prezentas vastan perspektivon al ordigo de la Flava Rivero. En la jaro 1952, Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon **"Bone aranĝu la Flavan Riveron"**. De tiam, oni ekplanis ordigi la riveron. Oni volis ne nur elradikigi la katastrofojn kaŭzitajn de la rivero, sed ankaŭ plene ekspluati kaj utiligi ĝian riĉan akvofonton en irigacio, elektroprodukto kaj navigacio por ĝisfunde ŝanĝi la fizionomion de la baseno de la rivero. Nun sur la trunko de la Flava Rivero estas konstruitaj sinsekve kelkaj grandaj hidroelektraj stacioj. Liugiahia estas unu el ili. Kaj aliaj hidroelektraj stacioj estas en konstruado aŭ projektado.

Hidroelektrejo Liugiahia estis ekkonstruita en granda antaŭensalto de la jaro 1958. En 1969 ĝia unua generatora kompleto komencis funkcii. Kiel granda akvoutiliga pivota konstruaĵo ĝi ĉefe produktas elektron kaj samtempe ludas rolon en prevento de inundo kaj glacia bloko, irigacio, fiŝbredado k.a. Ĝiaj projektado, konstruado, fabrikado kaj muntado de instalaĵoj ĉiuj estis plenumitaj de nia lando mem.


La hidroelektrejo konsistas el akvobara kaj akvodrena konstruaĵoj, elektroproduktejo kaj transformatorejo. La ĉefa digo kiel ĉefa konstruaĵo altas je 147 metroj kaj ĝia supraĵo longas je 213 metroj kaj larĝas je 16 metroj. En la elektrejo oni instalis kvin grandtipajn generatorajn kompletojn, inkluzive la 300,000-kilovatan hidroturbinan generatoran kompleton kun interne farita duobla akva malvarmigo produktita de Ĉinio. Kun 1,225,000-kilovata kapacito de instalitaj generatoroj, la elektrejo produktas elektron ĉiujare pli multe ol la totala kvanto de la malnova Ĉinio. Ĝia funkciado liveras grandan kaj malaltkostan elektran energion por la nordokcidenta regiono de nia lando kaj rapidigis disvolviĝon de tieaj industrio kaj agrikulturo. Dank' al la alta aŭtomatigo la laboro de la hidroelektrejo iras en sekureco.

Post la granda digo troviĝas arta lago kun areo de 130 kvadrataj kilometroj kaj enteno de 5,700 milionoj da kubmetroj da akvo. Racie reguligi fluokvanton de la akvorezervejo povas ne nur kontentigi bezonon de la hidroelektrejo mem, sed ankaŭ helpi kelkajn elektrejojn en ĝia malsupra baseno en elektrodonado, kamparojn en irigaciado kaj urbojn en industria produktado.

La drena konstruaĵo povas dreni grandan diluvon maloftan en cent jaroj, dank' al kio la minaco de diluvo al la regiono de Lanĝoŭ estas eliminita.


Dum la konstruado prenante Maŭzedongpenson kiel direktilon kaj kun la revolucia spirito de alta respondecemo al la Partio kaj la popolo, vastaj laboristaj amasoj venkis malhelpon kaj subfosadon de reviziisma linio, superis multajn malfacilojn kaj senĉese antaŭenpuŝis la konstruadon.

# Hidroelektrejo Liugiahia



Potenca kurento de la elektrejo Liugiahia estas sendata tra alttensiaj dratoj al diversaj lokoj de la nordokcidenta Ĉinio.

Veldistoj en laboro




Laboristoj, kadroj kaj teknikistoj kune studas pri teknika renovigo




Mezuristoj en la konstruejo





Instali generatoran kompleton















Hidroturbina generatora kompleto (*maldekstre*)
Alttensia elektra reto (*supre-maldekstre*)
Ekzameni alttensian linion (*supre*)





Akvorezervejo





Kanalo por lasi superakvon

En la komenco de printempo, 1973, komenciĝis muntado de la 300,000-kilovata hidroturbina generatora kompleto kun interne farita duobla akva malvarmigo. Plenumi la muntadon antaŭ fino de junio de la nomita jaro estis tre malfacile pro ĝia kolosa korpo kaj kompleksa strukturo.


Unue oni devis munti padelradon, kiu kvazaŭ malsupren pendanta konvolvulo kun diametro de pli ol kvin metroj kaj pezo de 120 tunoj estas ĉefa parto de hidroturbino. Por faciligi ĝian transportadon oni dupartigis ĝin. Nun por fari la du duonojn en unu tuton kun bona kvalito, oni devis senhalte fari veldon en alta temperaturo. Plenumi la laboron estas tre malfacile por veldistoj. Sed, tio estis nenio por la ĉinaj laboristoj harditaj en la granda kultura revolucio. Partiano Ĝang Huanĝi, estro de velda grupo, kune kun dek junaj veldistoj prenis sur sin la taskon. Temperaturo interne de la padelrado estis tiel alta ke ŝvito de laboristoj tramalsekigis iliajn kostumojn. Malgraŭ tio, ili senhalte laboris dekses horojn kaj fine veldis ilin en unu tuton.


Post tio, oni devis frotrondigi la supran kaj malsupran radringojn, kaj la diferenco de duondiametro devas esti malpli dika ol tiu de kvar haroj. Pro ĝia koloseco oni ne povis prilabori ĝin per maŝinoj. Laŭ malnova kutima frotmetodo oni bezonas unu monaton kaj duonon ĉiutage en tri deĵoroj por plenumi la taskon. Maljuna laboristo Ĝang Ŝoŭhu kaj liaj kunuloj decidis reformi frotrondigan instrumenton. Per kolektiva saĝo ili mem fabrikis ekipaĵon, ripete faris eksperimentojn kaj fine ellaboris elektran frotrondigan instrumenton kaj je 20 tagoj antaŭplenumis la taskon laŭ kvalita normo difinita de la ŝtato.

Post tagnokta diligenta laborado la generatora kompleto estis sukcese muntita en la fino de junio kaj komencis doni elektron.

Dum konstruado miloj kaj dekmiloj da diversnaciaj popolanoj laboris ŝultron ĉe ŝultro kaj pli ol 400 unuoj de pli ol 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando disvolvis la spiriton de socialisma kunlaboro kaj liveris materialojn al kaj fabrikis ekipaĵojn por la hidroelektrejo. Sub helpado kaj bona aranĝado de la Partio kaj la registaro la popolamasoj de la elektreja sidejo transloĝiĝis en novajn domojn. La sukcesa konstruo de Liugiahia plene enkorpigis la superecon de la socialisma sistemo kaj estas unu el la grandaj fruktoj de la granda kultura revolucio.

*Akvorezervejo de la Hidroelektrejo Liugiahia*





*Arbohakistino*

# Arbara Regiono de Granda Hing-an-montaro en konstruado

BIAN LINVEN

LA ondanta Granda Hing-an-montaro en la plej norda parto de Hejlonggiang ricevis nomon la "verda trezorejo" de Ĉinio pro sia senlima arbaro.

Ĝi sin trovas proksime de la malvarma zono. Tie la jara meznombra temperaturo estas 0°C, la plej malalta 50°C sub la nulo kaj vintro longas je ok monatoj dum kiuj la vasta tero estas glaciiĝinta kaj ĉie prezentiĝas arĝenta mondo, tial ĝi estas nomata ankaŭ "malpermesita malvarma loko".

Sed ekde la jaro 1964, arbohakistoj, kadroj kaj batalantoj de fervojaj trupoj venintaj el diversaj lokoj komencis ekspluati kaj konstrui tiun arbaran regionon. Kun venka disvolviĝo de la Granda Proleta Kultura Revolucio la Granda Hing-an-montaro estis jam konstruita en meĥanikan lignoproduktan bazlokon kun certgrada skalo.

## PROSPERA LIGNOPRODUKTADO

Starante sur pinto de la ĉefa monto Ilkuri de la Granda Hing-an-montaro, oni povas vidi, ke la senlima arbara maro estas en smeralda verdeco, traktoroj streĉe laboras en la arbohakejo; ŝarĝaŭtoj unu post alia sin direktas al lignotenejo; trajnoj plenŝarĝitaj de lignoj kuras inter montoj al aliaj lokoj kaj novaj domoj el ruĝaj brikoj kaj blankaj tegoloj kaj neĝkoloraj tendoj punktiĝas dise sur la montdeklivoj. Kia vivoplena bildo!

Tiu bela bildo estas pentrita de la laboremaj ekspluatantoj de la Granda Hing-an-montaro per la ferŝtala volo.

Antaŭ dek jaroj Tajuan estis ankoraŭ nomata "malpermesita malvarma loko". Kun alteco de pli ol 1,300 metroj super la mara nivelo ĝi estas firsto de la Granda Hing-an-montaro kaj ankaŭ la fonto de Tahe-rivero, pro tio ĝi akiras la nomon Tajuan. (Tajuan signifas fonton de Tahe en la ĉina lingvo.) Bajgala-monto, la plej alta pinto de la Granda Hing-an-montaro troviĝas apud ĝi. Tie en vintro la plej malalta temperaturo povas malleviĝi ĝis 56°C sub la nulo kaj en ĝia norda montdeklivo la neĝo kaj glacio ne degelas eĉ en plej varma somero. En la komenca vintro de 1965, dekoj da ekspluatantoj venis tra primitiva arbaro al Ilkuri-monto. Tie ili starigis tendojn, faris litojn per lignoj, preparis manĝaĵon per kaldrono subtenata de ŝtonoj kaj alportis glaciajn pecojn por akvouzo, kaj tiel ili ekkomencis malfacilan sed signifoplenan vivon. Ili foje kaj refoje studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kaj kuraĝigis sin en laboro per la heroaj faroj de Daking-aj laboristoj. Ili diris: "Sub brilaj lumoj de la pensoj de Prezidanto Maŭ ni estas neniam venkeblaj." Spitante frostecon de pli ol 40°C sub la nulo, ili transpasis glaciriverojn, torentojn kaj montojn por elekti arbohakejon.

La Granda Proleta Kultura Revolucio antaŭenpuŝis la konstruadon de la arbara regiono. Dank' al la kritiko al la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki

kaj Lin Biaŭ plialtiĝis la konscio de la konstruantoj de la Tajuan-a Ligno-produktejo pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj, kaj pli ardas ilia politika fervoro por ekspluati kaj konstrui la arbaran regionon. Ili diris, ke ili nepre devas komplete frakasi la intrigon de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ pri restarigo de kapitalismo kaj pli energie konstrui socialismon. Kun arda batalvolo ili penlaboris kaj rapide novigis la fizionomion de la arbara regiono. Dum la tempo de pluraj jaroj ilia celo konstrui prosperan lignoproduktan bazlokon estis realigita. Ekde la jaro 1971, ili ĉiujare superplenumis la taskon de la ŝtato, sume produktis 620,000 kubmetrojn da lignoj kaj donis al la ŝtato profiton de 12,000,000 juanoj, kiu superis la monsumon investitan de la ŝtato je pli ol 4,000,000 juanoj.

La antaŭe senhoma "malpermesita malvarma loko" nun jam fariĝis prospera meĥanika lignoprodukta bazloko.

## TRAFIKO EN SENLIMA ARBARO

Veturante per aŭto sur monto alta je pli ol 1,000 metroj super la mara nivelo oni vidas malsupren ke trans torentoj kaj rapide fluantaj riveroj estas multaj pontoj. Hodiaŭ multajn lokojn de la Granda Hing-an-montaro povas atingi aŭtoj tra ŝoseoj.

Antaŭe en tiu loko estis nek aŭtovojo nek fervojo, kaj piedirado estis tre malfacila por ne paroli pri veturado. Por enporti konstruajn materialojn en la montojn kaj transporti lignojn al aliaj lokoj de la patrolando, la heroaj batalantoj de la fervojaj trupoj kaj vojkonstruantoj de la arbara regiono penlaboregis dum dek jaroj en frosteco de 40°-50°C sub la nulo kaj konstruis fervojojn, milojn da kilometroj da aŭtovojoj kaj centojn da pontoj. Ambaŭflanke de la vojoj oni starigis stacidomojn kaj domojn por vojdeĵorantoj.

Kiel oni konstruis tiujn vojojn? Sube ni parolu pri la vojkonstrua taĉmento n-ro 1.


En 1974 la taĉmento n-ro 1 ricevis taskon konstrui aŭtovojon longan je 15 kilometroj en Hiufeng kiu devas trapasi Tatoŭ-marĉejon 5.5 kilometrojn longan. Tiam la taĉmento havis nur cent personojn. Pro tio ili vizaĝis al granda malfacilo. Sed tio estas nenio! Sub la gvido de la partia filio, la laboristoj kritikis la krimon de Lin Biaŭ, kiu imitis Konfucion por restarigi la malnovan socisistemon, kaj tio ege vigligis ilian aktivecon por konstrui socialismon. Por konstrui tiun vojparton oni devis unue surmeti ŝtonetojn sur la marĉejo por ke maŝinoj ne eniĝu en ĝin. Sed estis malfacile por akiri ŝtonetojn en aprilo, kiam la Granda Hing-an-montaro estis ankoraŭ plenkovrita de neĝglacio. La taĉmentestro kaj maljunaj laboristoj Gaŭ He kaj He Lajki multe cerbumis pri tio kaj decidis nepre venki tiun malfacilon. Malgraŭ severa frosteco kaj neĝŝtormo ili surgrimpis monton, faris truojn sur kruda montdeklivo malmola kiel ŝtono kaj akiris grandan kvanton da ŝtonetoj per eksplodo. Poste ĉiuj taĉmentanoj tuj ĵetis sin en la penigan batalon timante nek neĝadon nek malvarmon kaj finsternis la ŝtonetojn sur la Tatoŭ-marĉejo antaŭ alveno de degela tempo, kaj tio garantiis la glatan iradon de la posta vojkonstruado.

## LA UNUA GENERACIO DE ARBOHAKISTINOJ

En profundo de la arbaro sur la norda deklivo de Ilkuri-monto troviĝas kelkaj tendoj ĉirkaŭitaj de ligna barilo, kaj sur ĝiaj pordoj estas skribitaj du vicoj da ruĝaj ideografiaĵoj:

*La bravaj junulinoj luktas en l' arbaro, kiu brilas pli smeralde,*
*Nova l' generacio brodas sian landon, kiu ĉarmas pli aparte.*

*Ligno-kolektado per aŭtoj*



Tio estas la bravaj vortoj de la intelektaj knabinoj de virina arbohaka grupo kaj ankaŭ resumo de ilia batala vivo.

En septembro de 1970 pli ol sepdek intelektaj junulinoj venis de Ŝanhajo kaj Hanggĝoŭ al tiu loko por partopreni en la arbara ekspluatado kaj konstruado. Ili studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *La Direkto de Junula Movado* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, petis maljunajn laboristojn rakonti pri ilia glora tradicio de penlukto en malfacilo kaj kritikis la absurdan teorion dissemitan de Konfucio kaj Lin Biaŭ ke "la virinoj estas sentaŭgaj". Ili esprimis ke ili preferus esti bravaj agloj fiere flugantaj en la vasta ĉielo ol timemaj fringoj ĉiam sin kaŝantaj sub tegmentrando, kaj ili decidis esti la unuaj arbohakistinoj por ekspluati kaj konstrui tiun "malpermesitan malvarman lokon".

La unua tasko kiun ili prenis sur sin estis konstrui laborpunkton. En la Granda Hing-an-montaro furiozas neĝŝtormo kaj frostas la tero en oktobro, kaj pro tio oni trovis nek teraĵon nek akvon. Sub direktado de maljunaj laboristoj ili ĉiutage piediris pli ol 10 kilometrojn sur montoj por instali tendojn, konstrui domojn por maŝinoj, vojon por transporti lignojn kaj fari aliajn preparajn laborojn. Ili tiel penlaboregis unu monaton kaj nova laborpunkto estis starigita en la profunda arbaro.

Nun ĉiuj laboroj de arbohakado, kolektado kaj transportado de lignoj estas farataj per maŝinoj. Kun la helpo de maljunaj laboristoj la junulinoj diligente lernis teknikojn. Foje kiam Ĉeng Jaĝi stiris traktoron sur montdeklivo por kolekti lignojn, subite la ŝnurego alkroĉiĝis al ligno, kaj la traktoro neniel povis moviĝi. Kiam Ĉeng Jaĝi kapturniĝis pro forta skuado de la motoro, maljuna laboristo kuraĝigis ŝin: "Persistu! Ŝipo ne povas veturi ĉiam en favora vento kaj aŭto ne povas kuri ĉiam sur ebena vojo." Fine la obstrukco estis forigita. Aliafoje ŝi laboris kun sia traktoro sur montdeklivo kie multas ŝtonoj facile moveblaj kaj la vojo estas glitiga. Kiam la maljuna laboristo volis anstataŭ ŝi stiri la traktoron malsupren, Ĉeng Jaĝi diris: "Lerteco venas el hardado nur en malfacilaj kondiĉoj." Ŝi insiste penlaboregis dek tagojn kaj sekure transportis pli ol 1,000 kubmetrojn da lignoj de sur la monto. Ĝuste en tiaj malfacilaj kondiĉoj ili kreskis kaj fariĝis la lertaj arbohakistinoj, traktoristinoj kaj vinĉo-manipulantinoj de la unua generacio.

*Arbohakado*



En la ĉiam profunde disvolviĝanta movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, ili pli energie studas la verkojn de Marks kaj Lenin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kritikas la kontraŭrevoluciajn krimojn de Lin Biaŭ kiu imitis Konfucion por restarigi malnovan socisistemon kaj lian reakcian sensencaĵon ke iro de la intelektaj junuloj en montojn kaj en kamparon estas aliforma deviga laborado por punatoj. Dank' al tio pli altiĝis ilia konscio pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj kaj pli firmiĝis ilia decido enradikiĝi ĉe landlima regiono por revolucii. Ĉiufoje kiam ili vidis ke granda kvanto da lignoj dehakitaj de ili estas transportataj per trajnoj al diversaj lokoj de la patrolando, ili ĝoje ekkantis la mem verkitan kanton:

*En koro kun l' instruoj de la granda Prezidanto,*
*mi fikse loĝas en profundo de densa la arbaro,*
*kontribuante per arbohako al la patrolando,*
*mi pentras belan bildon en Hing-an-a arbomaro.*

En la pasintaj kelkaj jaroj ili produktis grandan kvanton da lignoj por la ŝtato, kaj dume ili rapide kreskis en la peniga batalo kontraŭ malfaciloj.

La arbaro de la Granda Hing-an-montaro liveras grandan kvanton da lignoj por la socialisma konstruado de la nova Ĉinio.

# Nova Brilo de Anestezo per Ĉinaj Tradiciaj Drogoj

POST la sukceso de apliko de akupunkturo en operacia anestezo, venas nova informo pri sukcesa uzo de ĉina tradicia narkotiko por la sama celo en nia medicina fronto. Kun entuziasmo mi vizitis lastatempe la Hospitalon sub la Hjuĝoŭ-a Medicina Instituto de Giangsu-provinco, kiu la unua sukcesis apliki ĝin en operacio.

### "KVAZAŬ EN DORMO"

En la dua tago post mia alveno al la hospitalo, mi tuj havis ŝancon mem atesti ĝian uzadon en kirurgio.

Kiam la kirurgo kaj helpistoj okupis sin pri preparaj laboroj, mi profitis la momenton por paroli kun la paciento, kiu jam kuŝis sur la operacia lito. Li estis 54-jara kamparano suferanta kanceron ĉe la fundo kaj kardjo de stomako. Timante ke li eble estas nervoza antaŭ la operacio, mi serĉis paroltemojn nekoncernantajn la operacion, sed li tute indiferente diris, ke li aŭdis de samĉambranoj, ke dum operacio sub anestezo per ĉinaj tradiciaj drogoj oni sentas sin kvazaŭ en dormo kaj post vekiĝo la operacio estas jam finita.

Tiam mi vidis ke flegistino engutigis al li en la vejnon ian diafanan likvaĵon. La apudstaranta anestezisto klarigis al mi, ke la engutitaĵo estas preparaĵo de stramonio, kiun la ĉina tradicia medicino uzas por narkoti. La nun uzata medikamento estas kompleksa preparaĵo kies ĉefa elemento estas stramonio.

Post kvar minutoj la paciento jam endormiĝis. La kirurgo tuj faris tranĉon sur la maldekstra flanko de la brusto longan je pli ol 30 cm. Tuj post tio la torako estis malkovrita rapide. Mi rigardis tiam la pacienton kaj trovis ke li dormas kviete sen ia esprimo de sufero.

Informite de la flegistino ke la sangpremo kaj pulso estas normalaj, la kirurgo lerte rompis ripojn kaj malfermis la torakon por detranĉi la kanceron. Dum la tuta operacio la paciento ĉiam restis en kvieta dormado, kiun mi de tempo al tempo observis.

Kiam la kirurgo komencis kunkudri la malfermaĵon, mi trovis kuraĝon por fari demandojn al la anestezisto kaj informiĝis de la lasta ke estis injektitaj kvar mg. da narkotaĵo, kio efikas ĝenerale 5-6 horojn, kiuj sufiĉas por fini operacion. Se okaze la tempo ne sufiĉas, oni povas ankoraŭ aldoni plian kvanton laŭbezone.


Uzo de tiu narkotiko ne bezonas specialan ekipaĵon nek postulas komplikan manipuladon. Ĉar ĝia efiko estas stabila, sekve ankaŭ pli sekura, ĝi estas taŭga por uzi ne nur en urbaj hospitaloj sed ankaŭ en fabrikoj, minejoj, vilaĝoj kaj aliaj bazaj unuoj.

"Ĉu ĝi havas iun alian avantaĝon?" mi demandis.

"Tiu narkotiko havas efikon por eviti ŝokon per plibonigo de mikrocirkulado de la paciento kaj tial taŭgas por fari operacion al paciento troviĝanta en stato de ŝoko, al kiu la ordinara narkotiko de okcidenta medicino estas neuzebla. La preparaĵo de stramonio cetere povas sekigi la spirkanalon, redukti ĝian sekrecion kaj teni ĝin en kontentiga stato taŭga por spirado. Tio faciligas la laboron de anestezistoj kaj evitas pulmajn perturbojn post la operacio. Krome la prezo de stramonio estas malkara, ekzemple, la kosto de narkotiko, nome la entenata stramonio kaj aliaj kuntenataj medikamentoj, entute estas nur 35 cendoj en la ĉina mono Renminbi."

### LA NARKOTA EFIKO DE STRAMONIO

Post la informiĝo ĉe kuracistoj, mi iris kun intereso rigardi la stramoniojn kulturatajn de la hospitalo. Tie en la ĝardeno mi vidis multajn



*Operacio sub drogherba anestezo en simpla operaciejo de kamparo*

blankajn florojn inter purpuraj branĉoj kaj verdaj folioj. Jen planto, kiun ni hejme nomas monta solano. Ĝi kreskas multe sur kampoj en mia hejmoloko, sed mi antaŭe tute ne sciis, ke ĝi havas tian grandan utilon, kvankam mi tiom multfoje vidis ĝin!

"Kiel vi trovis ĝian efikon?"

"Se temi pri eltrovo de ĝia utilo, tiu merito apartenas al niaj antikvaj praavoj!" respondis la anestezisto Vang Jantaŭ. Kaj li komencis rakonti pri ekapliko de la drogherboj en narkoto kaj priskriboj pri stramonio en antikvaj libroj.

En la dua jarcento p.K. kuracisto el Han-dinastio Hua Tuo eltrovis medikamenton nomatan *Mafej*-pulvoro. Laŭ registro en historia libro, li faris operacion post dono de *Mafej*-pulvoro kun vino, al paciento kiu troviĝis tiam "kvazaŭ en stato de ebrio kun nenia sento", se li ne povis sanigi lin per akupunkturo aŭ dono de dekoktaĵo. En medicina libro antaŭ la 16-a jarcento estas notita pri efiko de stramonio. En la fama farmacia verko *Ben Caŭ Gang Mu* de Li Ŝiĝen, farmaciisto en la mezo de la 16-a jarcento, estas pli detala priskribo pri la narkota efiko de stramonio. Li skribis ke trinko de vino preparita el stramonio igas homon ridi kaj danci, kaj plie skribis ke engluto de stramonio kune miksita kun alia drogo per varma vino "kaŭzas staton de konsciperdo kvazaŭ en ebrieco". "Post engluto de tio oni ne sentos doloron ĉe kirurgio kaj brulterapio." Sed, ĉar la reakcia regantaro de la malnova Ĉinio ne zorgis pri la bonfarto de la popolo kaj ignoris la tradician medicinon, la anestezo per tradiciaj drogoj ne estis uzata kaj disvolvita.

Post vasta informiĝo ĉe la gvidantoj kaj personaro de la hospitalo mi eksciis, ke post la Liberiĝo, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, ke **"La medicino kaj farmacio de Ĉinio estas granda trezorejo. Oni devas klopodi por esplori ilin kaj levi ilin al pli alta nivelo"**, la vasta kuraca laborantaro jam faris en 1958 bestan eksperimenton pri utiligo de tradiciaj drogoj en anestezo, en kombino kun eŭropa medicino. Sed tiu laboro estis serioze malhelpata de la subfosado kaj ĝenado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Post la likvido de tiu reviziisma linio dum la Granda Proleta Kultura Revolucio, la amasa movado de kombino de la ĉina tradicia medicino kun la eŭropa prospere leviĝis sur la medicina kaj higiena fronto. En la komenco de la jaro 1970, sub kuraĝigo de la sukceso de akupunktura anestezo, anestezistoj de la hospitalo la unuaj elmetis la proponon pri utiligo de ĉinaj tradiciaj drogoj en ĝenerala anestezo.

Ilia ideo tuj ricevis varman subtenon flanke de la gvidantoj kaj personaro de la hospitalo. Ili konsultis grandkvantan literaturon pri ĉinaj tradiciaj medicino kaj farmacio, vizitis multajn maljunajn kuracistojn kaj farmaciistojn, kolektis diversajn receptojn de *Mafej*-tizano cirkulatajn inter la popolo, kaj fine elkribris dekojn da kuracherboj. Post detala eksperimentado ĉe bestoj kaj propra korpo pri ĉiu drogo unu post alia uzata unuope kaj mikse, oni trovis ke stramonio havas pli bonan inhibician efikon por centra nerva sistemo.

La 8-an de julio 1970, la hospitalo faris la unuan aplikon de stramonio en anestezo por fortranĉo de teroido. Sukcesis la operacio, kaj ankaŭ kelkaj sekvintaj operacioj.

## REZULTO DE GRANDA KUNLABORADO

Rapide disvastiĝis la informo pri tiu sukceso. La novaĵo tuj trovis grandan atenton ĉe la partiaj kaj registaraj gvidantoj de diversaj niveloj kaj medicina fako. Socialisma kunlaborado estas farata de diversaj kuracaj unuoj, sciencesploraj institutoj, medicinaj lernejoj kaj farmaciaj fabrikoj sub la unueca gvido de la Partio. Ili entreprenis sciencan eksperimentadon pri uzado de ĉinaj tradiciaj drogoj en anestezo farmakologie, farmacikemie, farmacie kaj klinike. Fluidekstraktaĵo uzebla por engluto kaj klistero kaj envejna kaj enmuskola injektaĵo estis rapide elpreparitaj.

"Sen tio la anestezo per ĉina tradicia drogo ne povus sukcesi kontentige en tiel mallonga tempo," ĉiuj tiel diris en la hospitalo.


En la komenco, la paciento vekiĝis malrapide kaj ofte okazis ke la operaciito vekiĝis kelkajn horojn post la fino de la operacio. Tio alportis maloportunon al flegado kaj kuracado post la operacio. Post atenta analizado pri la rilatoj inter anestezo kaj vekiĝo laŭ la leĝo de kontraŭstaro kaj unueco de marksismo kaj grandkvanta esploro kaj eksperimento, la medicinaj laborantoj de la Ĵujgin-a kaj Aŭrora Hospitaloj en Ŝanhajo fine ekstraktis el iu sovaĝa planto eserinon (alkaloidon de la kalabara fabo), kiu montriĝis efika por veki anestezitojn en 2,300 kazoj ekde januaro 1972, sen komplikaĵo dum la uzado kaj post la operacioj. En la hospitalo mi mem atestis, ke ĉ. 10 minutojn post injekto de eserino la paciento malfermis siajn okulojn kaj ekrespondis al demandoj.

Kirurgo de la nomita hospitalo diris al mi: "Ni kirurgoj ofte renkontas streĉiĝon de abdomena muskolo malhelpantan la operacion ĉe abdomeno. Same estas la stato ĉe operacio sub anestezo per akupunkturo aŭ ĉinaj tradiciaj drogoj. Antaŭe oni uzis muskolmalstreĉan medikamenton de la eŭropa medicino, nun ni jam havas tiun preparitan el ĉinaj tradiciaj drogoj." Li montris al mi paketon da ampoloj etikeditan *Han Gi Song*, daŭrigante: "Ĝi estas kune fabrikita de la 88-a Hospitalo de ĈPLA, Suĝoŭ-a Medicina Instituto kaj aliaj unuoj post komuna esplorado. Per tio estas solvita unuapaŝe la problemo de nesufiĉa malstreĉiĝo de la muskolo dum anestezado per herbodrogo kaj akupunkturo."

De 1970, la nomita hospitalo jam faris pli ol 1,400 operaciojn sub anestezo per ĉinaj tradiciaj drogoj, kaj la nombro de kazoj en la tuta lando superis jam 40,000. La operacioj ampleksas la objektojn: pulmon, ezofagon, stomakon, lienon, uterektomion, replanton de rompita membro, urinan organon, orelon, nazon, gorĝon, okulon kaj buŝon. Sukcesoj estas ankaŭ notitaj pri operacioj faritaj al koro kaj kranikocerbo. Al ĉiuj pacientoj escepte de tiuj suferantaj de glaŭkomo, takikardio, serioza altsangpremo aŭ severa difektiĝo de hepata kaj rena funkcioj, la anestezo per ĉinaj tradiciaj drogoj estas aplikebla.

Sed, ĝi havas ankaŭ mankojn, ekzemple, nesufiĉan profundecon de la anestezo. Nun la kuracaj laborantoj kune kun siaj kolegoj de la lando daŭre klopodas por haki pli larĝan vojon al utiligo de ĉinaj tradiciaj drogoj en anestezo.

*Vizito al maljunaj farmaciistoj*



Inter Amikoj

# Vjetnamaj Esperantistoj en Ĉinio

ĴEN ZONG

EN oktobro de 1974, la Vjetnama Esperanto-Delegacio konsistanta el Dao Anh Kha, ĝenerala sekretario de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kaj ĝia komitatano Nguyen Dinh Phung, venis al Ĉinio por fari amikan viziton laŭ invito de la Ĉina Esperanto-Ligo.

## ĜOJA RENKONTIĜO

Ĉinio kaj Vjetnamio estas intimaj frataj najbaroj kaj interligataj per komunaj montoj kaj riveroj. Dum longtempa komuna batalado la dulandaj popoloj starigis inter si profundan amikecon. La vjetnamaj kunbatalantoj alportis la amikecon de la vjetnamaj popolo kaj esperantistoj al la ĉinaj popolo kaj esperantistoj.

En Pekino, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo Hujucz intervidiĝis kun la amikaj senditoj de la vjetnamaj esperantistoj kaj havis koran interparolon kun ili. Kamarado Ĵelezo, vicprezidanto de ĈEL, aranĝis festenon por niaj vjetnamaj kamaradoj. Ili kune laŭdis la amikecon inter la popoloj kaj esperantistoj de ambaŭ landoj. Estro de la delegacio Dao Anh Kha kun profunda sentimento diris: "Jam dum la foraj tagoj de nia Kontraŭfranca Rezistado, ni ambaŭ, kaj kelkaliaj vjetnamaj aktivuloj de Esperanto, havis la bonan ŝancon trovi kaj tralegi iujn ekzemplerojn de viaj antaŭaj eldonaĵoj. . . Tio donis al ni bonan ekzemplon en la praktikado de la internacia lingvo, kaj speciale, la famkonata eldiro de Prezidanto Maŭ favora al Esperanto estis tiam por ni altvalora kuraĝigo." Kamarado Ĵelezo diris: "Por ni ĉinaj esperantistoj, via vizito signifas subtenon kaj kuraĝigon al ni kaj prezentas al ni ankaŭ bonegan okazon por lerni de vi." Ili ambaŭ deziris, ke senĉese disvolviĝu la batala unuiĝo kaj frata amikeco inter la popoloj kaj geesperantistoj de Ĉinio kaj Vjetnamio.

Vespere de la 12-a de oktobro, okazis agrabla renkontiĝo de pekinaj esperantistoj kun la delegacio en salono de la Nacia Hotelo. Inter ili troviĝis ĉinaj veteranaj kaj junaj geesperantistoj. Kunestante, ili kore interparolis kaj ĝoje kantis.



*K-do Hujucz, prezidanto de ĈEL, k.a. kune kun la Vjetnama Esperanto-delegacio*

Kamarado Dao Anh Kha deklamis unu el poemoj de Prezidanto Ho Chi Minh, kaj iu juna ĉina esperantisto deklamis poemon mem verkitan en esperanto por bonvenigi la vjetnamajn kunbatalantojn. Post tio, ĉinaj esperantistoj ankoraŭ kantis pecojn el revoluciaj modernaj pekin-operoj, kanton *Vjetnamio — Ĉinio* kaj aliajn kantojn de Ĉinio kaj Vjetnamio. La salonon ĉiam plenigis kantado, ridado kaj aplaŭdado. Tiu sceno forte tuŝis la koron de la ĉeestantoj.


Dum restado en Pekino la delegacio vizitis la redakcion de *El Popola Ĉinio.* La esperantaj laborantoj de la redakcio varme akceptis la vjetnamajn kunbatalantojn kiel siajn karulojn. Ili korverŝe interparolis, interŝanĝis spertojn kaj kuraĝigis unu la alian. Kamarado de la redakcio diris: "Vjetnamaj kamaradoj aktive laboras en malfacilaj kondiĉoj, tiu spirito estas lerninda por ni." Ili kune esprimis, ke ili faros pli grandan kontribuon al plifortigo de amikeco inter popoloj kaj esperantistoj de diversaj landoj per siaj revuoj. Vespere de la sama tago, respondeculoj de la redakcio aranĝis por la delegacio bankedon. La vizito donis neforgeseblan impreson al la laborantoj de la redakcio de EPĈ.

### KVAZAŬ EN SIA PROPRA HEJMO


"Saluton al la heroa vjetnama popolo!" "Varman bonvenon al Vjetnama Esperanto-Delegacio!" Dum vizitado, la delegacio ĉiam trovis varman bonvenigon ĉu en fabrikoj aŭ en popolkomunumoj.

Kiam la vjetnamaj kunbatalantoj venis al la Pekina Aŭtofabriko, laboristoj kaj oficistoj de la fabriko ĝoje akceptis ilin. Respondeculo de la revolucia komitato de la fabriko rakontis al la gastoj, kiel la nomita fabriko, kiu antaŭe povis nur ripari aŭtojn, disvolviĝis en fabrikon pogrande produktantan aŭtojn. Li diris plie: "La Delegacio de la Sudvjetnama Virina Asocio por i-L beriĝo kun Nguyen Thi Dinh, vicĉefkomandantino de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio, kiel estro ĉijare vizitis nian fabrikon. Hodiaŭ ĉi tie ni akceptas la nordvjetnamajn kunbatalantojn, kaj pro tio ni sentas apartan ĝojon." Kiam la delegacio venis al la ĝenerala laborejo por muntado, la laboristoj varme bonvenigis ĝin per aplaŭdado. La vjetnamaj kunbatalantoj laŭdis laboran entuziasmon de la laboristoj kaj ilian spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj. La laboristoj kaj oficistoj de la fabriko petis la delegacion transdoni intimajn salutojn al la laboristaro kaj popolo de Vjetnamio.

Kiam la gastoj veturis per aŭtomobilo al la Ĉina-Vjetnama Amikeca Popolkomunumo en antaŭurbo de Pekino, kadroj de la komunumo kaj reprezentantoj de komunumanoj fervore akceptis kaj regalis ilin per fruktoj mem produktitaj. Hju



*En la kamparana hejmo de la Ĉina-Vjetnama Amikeca Popola Komunumo*




*La gastoj interparolas kun kamaradoj de la redakcio.*

Sufang, juna vicprezidantino de la revolucia komitato de la komunumo, diris al la gastoj: Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj kuraĝigo de venkoj de la vjetnama popolo en la nacisava milito kontraŭ la usona agresado, produktado de la komunumo akiris plenampleksan disvolviĝon. Informiĝinte pri tio, ke la komunumo ĉiujare liveras al la pekinaj urbanoj dek milionojn da kilogramoj da freŝa lakto kaj ducent tunojn da pekinaj anasoj, la vjetnamaj kunbatalantoj kun granda intereso rigardis bredejojn de laktobovinoj kaj anasoj de la komunumo kaj tie ili vidis, kiel funkcias melkomaŝinoj kaj ekipaĵoj por arta eloviĝo fabrikitaj de la komunumanoj mem. Irante sur la vojo de la komunumo, la ambaŭlandaj kunbatalantoj senĝene interparoladis kiel samfamilianoj. La vjetnamaj kamaradoj ĝoje diris, ke ĉi tie ili sentis sin kvazaŭ en sia propra hejmo.

Ĉinio kaj Vjetnamio estas landoj kun multaj nacioj. Ĉinio havas 55 naciojn. La studentoj el 52 nacioj lernas en la Centra Instituto por Nacimalplimultoj. Ĝiaj kadroj, instruistoj kaj studentoj apartenas al 53 nacioj. En Pekino, la delegacio ankaŭ vizitis la instituton kaj estis bonvenigata de la reprezentantoj de mongola, tibeta, ujgura, jaŭ-a kaj han-a instruistoj kaj studentoj. En varma atmosfero de kamaradeco plus frateco ili kune interparolis pri disvolviĝo de la nacimalplimultoj de Ĉinio kaj Vjetnamio kaj iliaj sukcesoj en tiu laboro per la ĉina, vjetnama lingvoj kaj Esperanto. Respondeculo de la instituto diris: "Ĉiufoje, kiam vjetnamaj kamaradoj venis al ni, ni ĉiuj sentis intimecon. Ili alportis al ni ne nur amikecon de la vjetnama popolo, sed ankaŭ ĝian batalan spiriton, kaj tio estas por ni granda kuraĝigo." Aŭskultinte tion la vjetnamaj kunbatalantoj estis kortuŝitaj kaj forte premis manojn de la ĉina kamarado kaj petis la lastan transdoni saluton al ĉiuj instruistoj kaj studentoj de la instituto.

*En la Pekina Aŭtofabriko*



## PROFUNDA FRATA AMIKECO

"Kiu ne atingos la Grandan Muron, ne estas bravulo!"

Akompanate de la ĉinaj esperantistoj, la delegacio faris ekskurson al la famkonata Granda Muro. En tiu tago, malgraŭ pluveto, la du pli-ol-50-jaraj vjetnamaj amikoj viglecplene ascendis la altaĵon de la Granda Muro kaj spektis belan pejzaĝon de la antikva muro. La vjetnamaj kamaradoj admiris grandecon de la ĉinaj laborantaj popolanoj kaj belecon de ĉinaj riveroj kaj montoj. La ĉinaj kamaradoj varme laŭdis heroan spiriton de la vjetnama popolo kaj tradician amikecon de la dulandaj popoloj en kelkmil jaroj. Ili diris: la Granda Muro estas grandioza kaj fortika, sed la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio estas pli grandioza kaj pli fortika.

La profunda amikeco de kamarado plus frato estas nerompebla de ĉia ajn forto. Dum vizitado de la vjetnamaj amikoj al Ĉinio, ĉie oni povis aŭdi vortojn "Profunda amikeco inter Ĉinio kaj Vjetnamio estas tiu de kamarado plus frato." "Ni estas samfamilianoj." Kamarado de la delegacio tre emocie diris: "Nia delegacio estas tre feliĉa reprezenti la vjetnamajn geesperantistojn veni al la ĉinaj gesamideanoj, por pasigi belajn tagojn plenajn de amikeco kaj solidareco inter vi, en la sino de la frataj ĉinaj esperantistaro kaj popolo."

Forlasinte Pekinon la Vjetnama Esperanto-Delegacio vizitis ankaŭ Ŝanhajon, Kantonon k.a. Kvankam ilia vizito estis mallonga, tamen ili postlasis profundan impreson al la ĉinaj geesperantistoj kaj faris kontribuon al disvolviĝo de amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Vjetnamio. Ĝis revido, la vjetnamaj kunbatalantoj!

# Maligna Inflacio

NUNTEMPE pli malboniĝas la ekonomia situacio en ĉiuj ĉefaj kapitalismaj landoj. Tiuj landoj samtempe montras multajn ekonomiajn simptomojn de produktaj stagno kaj depresio, inflacio kaj financa kaj mona krizoj.

Multaj signoj indikas seriozecon de la nuntempa situacio, kaj la plej danĝera el ili estas disvolviĝo de la maligna inflacio. De aŭtuno de 1973, la varprezoj de la ĉefaj kapitalismaj landoj senĉese altiĝis kvazaŭ ŝnur-rompita kajto, kun tiel granda rapideco kaj tiel vasta amplekso neniam viditaj post la Dua Mondmilito. Laŭ la materialoj publikigitaj de "Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Disvolviĝo", la lev-skalo de konsumaĵ-prezoj de la tuta 1973 en 24 ĉefaj kapitalismaj landoj kvarobligis tiun meznombran en la sesdekaj jaroj. Pli serioza fariĝis la situacio en la unua duono de 1974: en ĉiuj tiuj landoj escepte de Okcidenta Germanio, la konsumaĵ-prezoj leviĝis ĝis ducifera jara procento, ekzemple, tiu en Japanio je ĉ. 30%, en Italio je ĉ. 20%, en Britio kaj Francio je pli ol 16% kaj ankaŭ en Usono je 12.4%. Nun, ĉiam pli disvastiĝas tiu tendenco. Ni prenu Usonon kiel ekzemplon. La jara procento de la indico de pograndaj prezoj en julio 1974 jam atingis 44.4%, kio pluapaŝe levis la konsumaĵ-prezojn.

La alia signo de la serioza kaj danĝera ekonomia situacio en la kaplitalisma mondo estas tio, ke ekde la kvara trimestro de 1974 industria produkto reduktiĝis kaj stagniĝis. La totala valoro de la usona nacia produkto falis sinsekve en la lastaj tri trimestroj. Ĝia industria produkto malleviĝis kvar monatojn komence de decembro, 1973. Kvankam la produkto iom leviĝis en aprilo kaj majo de 1974, tamen ĝi stagnis en junio kaj julio kaj denove malleviĝis en aŭgusto. La industria produkto de Japanio malleviĝis kvar monatojn en la unuaj sep monatoj de 1974, kaj ĝia produkta indico de aŭgusto malleviĝis je 6.6% kompare kun la plej alta indico monate de 1973. La totala valoro de industria produkto de Britio en la unua duono de 1974 malleviĝis je 2% kompare kun tiu en la sama periodo de 1973. Kvankam Okcidenta Germanio sin apogis sur eksterlandaj mendoj, tamen ĝia industria produkto malleviĝis de la jaro 1974 pro la velkiĝo de enlanda merkato. Ĝia industria produkta indico en junio malleviĝis je 3.6% kompare kun tiu de novembro de 1973. Ankaŭ la industria produkto de Francio, Italio kaj aliaj ĉefaj kapitalismaj landoj dronis en stagneco aŭ malrapida kresko. Pri tio la brita semajna gazeto *Ekonomiisto* diris en julio de 1974: "La regreso de (kapitalisma) mondo... jam alvenis."

La industrioj de aŭto kaj domkonstruo, ŝlosilaj industrioj en la ĉefaj kapitalismaj landoj, dronis en malfacila abismo. La nombro de venditaj aŭtomobiloj en la Okcidento en la unua duono de 1974 malpliiĝis je 30% kompare kun tiu en la sama periodo de 1973, tiel ke multaj landoj devis draste redukti sian aŭto-produktadon. Ankaŭ la vendado de domoj fariĝis pli kaj pli malfacila, tiel ke kapitalistoj devis redukti la konstruadon de novaj domoj. En Usono, la domoj ekkonstruitaj en julio de 1974 reduktiĝis je preskaŭ 60% kompare kun tiuj en la sama periodo de 1973. La *Usonaj Novaĵoj kaj Monda Raporto* rekonis en la 2-a de septembro de 1974, ke la usona domkonstruado "glitas en sian plej seriozan krizon depost la granda depresio". En Okcidenta Germanio kaj Britio, la stato estas preskaŭ sama. La serioza reduktiĝo de la du ŝlosilaj industrioj ne povis ne influi aliajn branĉojn.

La seriozeco de la situacio kuŝas ankaŭ en tio, ke de la komenco de 1974 en la ekstera komercado de plejparto de kapitalismaj industriaj landoj aperis giganta malfavora saldo kun grandega internacia paga deficito. La malfavora saldo de ekstera komerco de Usono en la unuaj ok monatoj, 1974, atingis 2,100 milionojn da dolaroj kaj ĝia internacia

paga deficito en la unua duono de 1974 atingis 7,200 milionojn da dolaroj, preskaŭ egalajn al la totala internacia paga deficito de 1973 (7,700 milionoj da dolaroj). En la jaro 1974 finiĝis la stato al la ekstera komerco de Japanio, ke ĉiujare en la lastaj dekkelkaj jaroj ĝi havis grandegan favoran saldon, kaj aperis unuafoje en ĝi grandnombra malfavora saldo (5,240 milionoj da dolaroj). La malfavora saldo de ekstera komerco de Britio kaj Italio estas eĉ pli granda, kiu laŭtakse povos atingi respektive 10,000 milionojn kaj 12,000 milionojn da usonaj dolaroj. Por kovri sian grandegan internacian pagan deficiton, ili devis multe deprunti de aliaj. La eksterkomerca saldo de Francio en 1974 restis ruĝa monaton post monato, kaj ĝia taksita saldo de internacia paga deficito ĝis la fino de 1974 atingos 6,000 milionojn da usonaj dolaroj.


Premite de maligna inflacio kaj malleviĝo de produkto, pli kaj pli multaj entreprenoj en la ĉefaj kapitalismaj landoj devis ĉesigi sian funkciadon. 5,180 entreprenoj en Usono bankrotis en la unua duono de 1974, t.e. je 6% pli multe ol en la sama periodo de 1973. La bankrotintaj entreprenoj de Japanio jam atingis pli ol 5,500 en la unua duono de 1974, t.e. je 60% pli multe ol en la sama periodo de 1973. Kaj la ŝuldo de la entreprenoj bankrotintaj en septembro kreis novan rekordon en la historio. Ankaŭ multaj grandaj bankoj kaj kompanioj de Okcidenta Germanio, Britio kaj Aŭstralio bankrotis sinsekve. La Federacia Statistika Buroo de Okcidenta Germanio montris, ke 1974 estas "rekorda jaro de bankroto". La bankroto jam ektuŝis iujn grandajn entreprenojn kaj, pro tio ekteruriĝis la monopolaj kapitalistoj.

En tiu ĉi danĝera situacio, por transigi sian malfacilon, la monopolaj kapitalistoj eksigis grandan nombron da laboristoj, kio multigis senlaborulojn en la ĉefaj kapitalismaj landoj. Laŭ la oficiala statistiko, la senlaboreco de Usono leviĝis ĝis 5.8 procentoj en septembro 1974, kaj ĝiaj senlaboruloj sume nombriĝis 5,300,000 aŭ plimultiĝis je 440,000 personoj ol tiuj en aŭgusto. En Britio, la senlaboruloj superis 690,000 en aŭgusto, 1974, je 15% pli multe ol tiuj en julio, tiel ke aŭgusto fariĝis monato en kiu plej multe kreskis la nombro de senlaboruloj post la fino de la milito. En Okcidenta Germanio, la nombro de senlaboruloj senĉese leviĝis de la jaro 1974, kaj septembre atingis 557,000, je 5.7% pli multe ol tiu en aŭgusto.

La senĉesa malboniĝo de la financo kaj ekonomio en la ĉefaj kapitalismaj landoj neeviteble alportis tumulton al la mona merkato. Dum la lastaj jaroj, por eksciti ekonomion, la kredito de tiuj landoj jam ŝvelis ĝis danĝereco, kaj en 1974 aperis grandega internacia paga deficito, tial ili konkure prunteprenis de eksterlandaj bankoj, tiel ke draste leviĝis la kredita totalo de la "eŭropa mona merkato", kio multe seriozigis la situacion. La financaj rondoj de tiuj landoj multe maltrankviliĝis, ke se la landoj multe pruntepreníntaj ne povos pagi la ŝuldon, tio kaŭzos bankroton al grandnombraj bankoj kaj portos netakseblan seriozan rezulton al la tuta kapitalisma financa sistemo.

Ĉio ĉi tio akrigis la kontraŭdirojn proprajn de la kapitalisma sistemo, intensigis la politikan kaj socian krizojn en la ĉefaj kapitalismaj landoj kaj draste skuis ilian enlandan situacion. Trafite de

*Manifestacio de usonaj karboministoj*




*Aŭstraliaj laboristoj manifestacias kontraŭ la inflacio.*



la maligna inflacio kaj ekonomia krizo, la regantaroj de tiuj landoj havas neniun uzeblan kontraŭrimedon. Se oni aplikus inflacian rimedon por eksciti produkton kaj mildigi la krizon, do ili certe ne povos vidi la finon de la inflacio; se oni aplikus rimedon por deteni inflacion, do tio pliprofundigos la ekonomian krizon.

Por bridi la pli seriozan inflacion, la ĉefaj kapitalismaj landoj akceptis nombron da t.n. urĝaj rimedoj en sia lando. Sed, tiuj limigitaj rimedoj ne nur ne povis bridi inflacion, sed jam pli gravigis la malleviĝon aŭ stagnecon de produkto. Krome, ĉar ĉiuj ĉefaj kapitalismaj landoj estas samtempe sieĝataj de ekonomiaj malfaciloj, tial ekzistas nemultaj spacoj por ili transigi la krizon unu al alia. Nun, ili klopodas por redukti importojn kaj kreskigi eksportojn. Tio jam vekis dubon kaj maltrankvilon inter ili. La usona *Novaĵ-semajno* skribis en la 8-a de julio, 1974, ke, tio entenas "grandan danĝeron inciti eblecon de komerca masakro, kiu povos siaflanke konduki al (la kapitalisma) mondo ekonomian ruinigon".

La akuta falo de akciaj prezoj en la ĉefaj kapitalismaj landoj dum la pasintaj kelkaj monatoj profunde spegulis la malbonan humoron de popolanoj, kiuj perdis konfidon pri la ekonomia perspektivo. Oni ankoraŭ memoras ke la granda depresio volvinta la kapitalisman mondon en 1929-1933 komenciĝis ĝuste de la falego de akciaj prezoj, kaj ĉifoje la skalo de ilia falego jam superis tiun de 1929.

Nun, interne de la regantaj grupoj de la ĉefaj kapitalismaj landoj kaj sur gazetaro ĉiam pli multiĝas la diroj pri baldaŭa reapero de la granda ekonomia krizo 30-jardeka. Rilate al la nunaj faloj kaj grandaj perdoj de kelkaj bankoj en la Okcidento la ĉefartikolo de *Novjorkaj Tempoj* en la 7-a de septembro de 1974 montris, ke tiu situacio "devas servi kiel averto ke la speco de katastrofo kiu trafis la mondon en 1931 kun la disfalo de Aŭstra Kredit-Banko ne plu estas neimagebla".


*Britaj flegistinoj strikas postulante altigon de salajro kaj plibonigon de laborkondiĉoj.*




*Italaj laboruloj manifestacias por protesti kontraŭ pliigo de impostoj kaj altigo de prezoj fare de la registaro.*



*La usonaj kamionaj stiristoj obstrukcas aŭtovojojn per aŭtoj por protesti kontraŭ la leviĝo de petrolaj prezoj.*






# LISU-NACIO

ZONG MIN


*Lisu-a virino*

LISU-NACIO kun ĉirkaŭ pli ol tricent mil membroj loĝas ĉefe en la Nugiang-a Lisu-nacia Aŭtonoma Subprovinco, nordokcidente de Junnan, cetere en Ligiang, Baŭŝan, Dali, Dehong kaj Ĉuhiong, kaj malmulte en Hiĉang, Janbian kaj aliaj gubernioj de Siĉuan-provinco.

En la baseno de Nugiang-rivero koncentre loĝata de lisuoj, fekundas grundo kaj abundas pluvo, kiuj favoras agrikulturan produkton. Lisu-nacio okupiĝas ĉefe pri agrikulturo, kies produktaĵoj estas maizo, rizo, tritiko, sojfabo kaj batato. Tie la ekonomiaj plantaĵoj estas lino, laka arbo, sukerkano k.a. Ambaŭborde de la rivervalo dense kreskas arbaroj, kie vivas tre valoraj animaloj kaj produktiĝas feloj kaj drogherboj.

Lisu-nacio havas longan historion. En literaturoj de Tang-dinastio en la sepa jarcento p.K. ĝiaj nomo kaj aktivado estis jam registritaj. En la komenca periodo lisu-oj loĝis ĉe la okcidenta bordo de Ginŝa-rivero kaj en Muli, Janjuan kaj Janbian, sudokcidente de Siĉuan. Antaŭ ĉ. 400 jaroj, parto de lisu-oj transloĝiĝis de la okcidenta bordo de Ginŝa-rivero al basenoj de la riveroj Lancang kaj Nugiang.

Antaŭ la Liberiĝo, la socia ekonomio disvolviĝis neekvilibre en lisu-naciaj lokoj. En Ligiang, Dali, Baŭŝan, Hiĉang k.a. la socia ekonomio de lisu-oj jam apartenis al la feŭda bienula ekonomio, tial ilia produktoforto disvolviĝis preskaŭ egale al la nivelo de han-oj kaj baj-oj. Tamen en landlimaj regionoj kiel ĉe Biluohjue-monto kaj Gaŭligong-monto, kie loĝas lisu-oj, la produktonivelo estis malalta, instrumentoj krudaj, kaj la ĉefa produktoformo primitiva. Tiam metio kaj komerco ankoraŭ ne apartiĝis de agrikultura produkto kaj labordivido estis neklara. Oni faris notojn sur ligno per gravuro, kalkulis per ŝnurnodado kaj interŝanĝis objektojn kontraŭ objektoj. En la Nugiang-a lisu-nacia loko, kvankam la privata proprieto de agro jam difiniĝis, tamen la terposedo estis ne tre koncentra. Tie ankoraŭ konserviĝis postrestaĵoj de primitiva kunlaborado kiel "kuna plugado". Oni kune laboris kaj egale distribuis la produktaĵojn.

Lisu-oj ŝatas sin vesti per nigraj vestoj kaj virinoj portas mallongan ĉemizon kaj longan jupon sur la korpo, diademon el ruĝaj vitraj perloj aŭ konkopecoj sur la kapo kaj ringon el diverskoloraj vitraj perloj sur la kolo. La Lisu-a popolo lertas en kantado kaj dancado. Ili havas tre riĉajn artajn kreaĵojn, kiel poemoj kaj melodioj kun nacia karaktero kaj forta impreso. Inter la diversformaj dancoj troviĝas *Danco pri Aŭtuna Rikolto*, *Danco de Ĉasistoj* k.a. spegulantaj produktan laboradon. Sed antaŭ la Liberiĝo, pro peza subpremado la kultura aktivado de la lisu-nacia popolo ne povis esti plene disvolvita.

Feŭdaj regantoj de ĉiuj dinastioj faris kruelajn ekspluatadon kaj subpremadon al lisu-oj. Kaj la invado de imperiismo alportis al ili novajn suferojn. La popolkanto de lisu-oj diris siatempe: "Kiel ajn multaj estas steloj sur la ĉielo, tamen ili estas malpli multaj ol suferoj de lisu-oj. Kiel ajn

alta estas Gaŭligong-monto, tamen ĝi havas kapon kaj kiel ajn longa estas Nugiang-rivero, tamen ĝi havas fonton, sed la suferoj de lisu-oj estas neniam finparoleblaj!" La kanto montris la tragedian vivon de lisu-oj antaŭ la Liberiĝo. La statistiko pri Eduloluo-brigado de Bigiang-gubernio diras, ke nur en dek jaroj antaŭ la Liberiĝo 230 malriĉaj kamparanoj el 1,000 vilaĝanoj mortis pro turmentado de loka registaro, mastrosinjoroj kaj bienuloj.

La klasa kaj nacia subpremado vekis fortan kontraŭstaron de la lisu-nacia popolo. De la 19-a jarcento ĝi faris multajn armitajn batalojn kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. La granda leviĝo eksplodita en Vejhi, en la jaro 1801, sub la gvido de lisu-nacia kamparano Heng Hianpeng kaj kun partopreno de lisu-oj, nu-oj, baj-oj, han-oj, naŝi-oj k.a. havis relative profundan influon. La leviĝo daŭris pli ol du jarojn, disvastiĝis en ok gubernioj proksime de Vejhi kaj ekstermis milojn da oficiroj kaj soldatoj de King-dinastio kaj mastrosinjoroj.

De tiam la revoluciaj bataloj de lisu-oj sekvis unu la alian. En 1907 lisu-oj, tibetanoj, nu-oj kaj aliaj nacianoj indigne bruligis preĝejon konstruitan de imperiistoj sur la de ili okupita tero en Bajhaluo ĉe Gaŭligong-monto. En 1908, lisu-oj ekzekutis imperiisman armitan spionon, kiu enŝteliĝis en Fugong sub ŝildo de "prospektorado". En 1911, lisu-oj kaj ĝingpo-oj faris bravan kaj obstinan batalon kontraŭ la britaj agresantoj, kiuj perforte okupis nian teritorion Pianma, Gulang, Gangpang k.a... En 1941-1943 lisu-oj en Fugong brave leviĝis por bari marŝon de la japanaj agresantoj entrudiĝantaj al okcidento de Junnan-provinco. En la revoluciaj bataloj kontraŭ fremdlandaj agresantoj kaj enlandaj reakciaj regantaj klasoj, lisu-oj batalis kune kun aliaj nacianoj ŝultron ĉe ŝultro kaj kontribuis al defendo de la landlimo kaj firmigo de unuiĝo de nia patrujo.

En komenco de 1950, la Ĉina Popola Liberiga Armeo enmarŝis en Nugiang-regionon kaj ekde tiam la lisu-nacia popolo liberiĝis kaj fariĝis mastro de la lando. Sub direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj naciaj politikoj de la Partio, realiĝis egaleco kaj unuiĝo de nacioj, aboliĝis ekspluata sistemo, fondiĝis popola demokratia reĝimo kaj efektiviĝis aŭtomateco de naciaj regionoj, kio multe akcelis la disvolviĝon de politiko, ekonomio kaj kultura afero en lisu-nacia regiono.

Kun granda socialisma aktiveco lisu-oj disvolvas agrikulturan produktadon. Sub la alvoko de Prezidanto Maŭ "**organiziĝu**" lisu-oj fondis sinsekve agrikulturajn interhelpajn grupojn, agrikulturajn kooperativojn kaj popolajn komunumojn kaj praktikis sciencan terkulturadon. Dank' al profunda disvolviĝo de la amasa movado de "lerno de Daĝaj en agrikulturo" riĉaj rikoltoj de greno estis akiritaj en lisu-naciaj regionoj en lastaj jaroj. Nun, en Nugiang-a Lisu-nacia Aŭtonoma Subprovinco akvoutiligaj konstruaĵoj jam nombriĝis 2,999. La areo de rizkampoj kaj fiksitaj agroj oble plimultiĝis kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo kaj efektiviĝis memprovizo de greno kun superfluo. Puŝate de la Granda Proleta Kultura Revolucio, Kangda-komunumo de Bigiang-gubernio kreis pli ol 130 hektarojn da ŝtuparaj kampoj Daĝaj-tipaj kaj konstruis sur Gaŭligong-monto 13 akvokondukajn kanalojn kun totala longeco de 55 kilometroj. En 1973, la totala produktokvanto de greno de tiu komunumo atingis 955,000 kilogramojn, t.e. plimultiĝis je pli-ol-unu-oblo kompare kun tiu de 1965.

Antaŭ la Liberiĝo, en lisu-naciaj lokoj troviĝis neniu industrio. Post la Liberiĝo la naciaj indus-

*Lisu-a viro en ĉasado*



trioj prospere disvolviĝis kvazaŭ fungoj post pluvo. Nun la tuta subprovinco jam havas industriojn de farado kaj riparo de agrikulturiloj, elektro, mineksPluato, paperfarado, medikamento, presado, salfarado, sukerfarado, vinfarado, olepremado, ledo, fajencaĵo, briko kaj tegolo, konstruado, arbohakado kaj prilaboro de manĝaĵoj. Kun disvolviĝo de industrioj pli kaj pli grandiĝis ankaŭ la vicaro de laboristoj.

En lisu-nacia loko de Nugiang altas montoj, danĝeras riveroj kaj interkruciĝas profundaj valoj, kiuj portis malfacilecon al trafiko. Antaŭ la Liberiĝo, inter lisu-oj cirkulis tia diro: "De antikveco estis nur unu vojo sur Biluohjue-monto." Por akiri salon, teon, ŝtofon, kudrilojn, fadenojn kaj aliajn vivbezonaĵojn, lisu-oj devis dorsporti ilin dum kelktaga vojaĝo, transpasante riveron per kablo kaj transgrimpante Biluohjue-monton je pli ol 4,000 metroj altan. Nun oni jam konstruis ŝoseojn kaj pontojn super riveroj kaj valoj, kio fundamente ŝanĝis la postiĝintan fizionomion de la trafiko de lisu-nacia loko kaj strikte interligis Nugiang-regionon kun la aliaj lokoj de la patrujo.

En la pasinteco la lisu-naciaj laborantaj popolanoj estis rigardataj de reakciaj regantoj kiel "sovaĝuloj". En pli ol 20 jaroj de la regado de kuomintangaj reakciuloj en Nugiang-a lisu-nacia loko estis nur du mezlernejanoj. Post la Liberiĝo, tieaj kultura kaj eduka aferoj rapide disvolviĝas, nova skribado signata per latinaj literoj estas disvastigita kaj gefiloj de la laborantaj lisu-oj ĝenerale vizitas lernejojn. Nun, la nombro de elementaj lernejoj en la aŭtonoma subprovinco plimultiĝis de pli ol 500 antaŭ la Granda Kultura Revolucio ĝis pli ol 900 nun. Lisu-oj jam havas siajn proprajn studentojn, instruistojn, kuracistojn, industriajn, agrikulturajn kaj sciencajn teknikistojn de la unua generacio. Tie ĉiu gubernio havas sian hospitalon, ĉiu komunumo kuracejon, ĉiu brigado kooperan kuracan stacion. Granda nombro da nudpiedaj kuracistoj fervore servas al la popolo.

En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio lisu-oj en Nugiang jam havas grandan teorian vicaron konsistantan el pli ol 7,700 homoj. Ili aktive helpas diversnaciajn popolanojn en studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ kaj fundamenta linio de la Partio. Lige kun reala stato de siaj lokoj ili profunde kritikas krimojn de Lin Biaŭ pri restaŭro de kapitalismo kaj lian kontraŭrevolucian reviziisman linion kaj kritikas konfucianismon, la ideologion de reakciaj dekadencaj klasoj, por levi konscion pri batalo inter la du klasoj kaj du linioj. La lisu-nacia popolo decidis kune kun aliaj popoloj de la tuta lando venke marŝi antaŭen sur la socialisma vojo.




### GRANDA IRIGACIA KONSTRUAĴO EKFUNKCIIGITA EN ŜANHI

En la granda kultura revolucio oni konstruis en Ŝanhi-provinco grandan konstruaĵon irigacian per akvo de la Flava Rivero — la unuan parton de la pivota konstruaĵo de Dajudu-a elektra kaj irigacia stacio de Ĵujĉeng-gubernio. Ĝi ekfunkciis en oktobro de 1974.

Situante sude de Ŝanhi kaj ĉe norda bordo de la Flava Rivero, Ĵujĉeng troviĝas en altebenaĵo kun montetoj. La Flava Rivero fluas 75 kilometrojn tra la gubernio. Ĉar la fluejo troviĝas en valo profunda je pli ol 200 metroj, ĝi ne povis esti utiligata kaj pro tio la altebenaĵo suferis de sekeco en longa tempo. En oktobro de 1970 la popolo de Ĵujĉeng decidis konstrui la nomitan konstruaĵon por konduki akvon de la Flava Rivero en kampojn.

Tiu konstruaĵo kun totala instalita kapacito de 190,000 kilovatoj, pumpdisstanco de 214 metroj kaj akvoleva kvanto de 5.7-8.5 kubmetroj po sekundo povas irigacii 19,000 hektarojn da kampoj. Post finkonstruo de la tuta konstruaĵo la areo de irigacieblaj kampoj de la tuta gubernio plimultiĝos ĝis 32,000 hektaroj.

La unuaŝtupa stacio de la konstruaĵo estas starigita sur la digo de la ĉefa fluo de la Flava Rivero kaj ekipita per movebla pumpilo, kiu konformas al variado de akvonivelo de la rivero. La elpumpita akvo post sedimentiĝo de sablo eniras en la duaŝtupan stacion kaj poste estas kondukita pli alten en la kampojn tra tuboj je 193 metroj longaj.

# Liuhia Ĝi Refutis Konfucion



TIO okazis en la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno antaŭ pli ol 2,400 jaroj, ke la gvidanto de sklava insurekcio Liuhia Ĝi (aŭ Ĝi de Liuhia) karnotranĉe refutis Konfucion. Tiam la ĉina socio troviĝis en granda ŝanĝiĝo, dum kiu la sklava sistemo transpasis al la feŭda sistemo. Por savi la sklavan sistemon el disfalo, la dekadencanta sklavoposedanta aristokratio pli kruele subpremis la sklavan klason kaj aliajn laborulojn. Tial, la armitaj ribeloj de sklavoj leviĝadis unu post alia. Ekzemple, en la jaro 550 a.K. sklavoj ribelis en Ĉen-regno (en la loko oriente de la nuna gubernio Kajfeng, Henan, kaj norde de la nuna gubernio Bohian, Anhuj), en kiu la grandaj sklavoposedantoj King Hu kaj King Jin estis mortigitaj; en 520 a.K. ribelis sklavoj-metiistoj de la reĝo de Ĝoŭ-dinastio, kaj la reĝo mem estis portempe forpelita; en 470 a.K. eksplodis la ribelo de sklavoj-metiistoj de Vej-regno, dum kiu la estro de sklavoposedantoj Vej Ĉugong (duko Ĉu de Vej) devis fuĝi terurite por savi sian vivon. La trupo de sklava insurekcio sub la gvido de Liuhia Ĝi estis la plej fama en tiu tempo.

Liuhia Ĝi propre nomiĝis Ĝan (familia nomo) Ĝi (persona nomo), kiu ricevis la nunan nomon ĝenerale konatan pro tio, ke li vivis en Liuhia (en la okcidenta parto de la nuna Ŝandong). Li gvidis la sklavan insurekcion en la regnoj Ki kaj Lu (ambaŭ en la nuna Ŝandong) kaj komandis tre fortan trupon el 9,000 personoj, kiuj batalis de unu loko al alia, forte skuante la dekadencan sklavsistemon kaj donante fortajn batojn al la reganta klaso.

La aristokratoj-sklavoposedantoj tre timis kaj malamis la trupon de Liuhia Ĝi. Ili disvastigis kalumniojn, insultante ke li estas "rabisto" manĝanta homan karnon kaj trinkanta homan sangon. Kiel proparolanto de la dekadenca sklavoposedanta klaso, Konfucio montris sin ĝismedole malamika al Liuhia Ĝi, insulte nomis lin "rabisto Ĝi", "malutilo por la mondo" kaj decidis elimini tiun "malutilon". Kunagante kun la sklavoposedanta aristokratio en la subpremado al la insurekcio, li persone elpaŝis por provi allogi lin al submetiĝo. Profitante la okazon, kiam la trupo de Liuhia Ĝi sin refreŝigis kaj reordigis en sudo de Tajŝan (monto en la gubernio Taj-an en mezo de Ŝandong), li ŝajnigis tre amika por peti intervidiĝon kun Liuhia Ĝi. Persone suferinte pezan subpremon de sklavsistemo, Liuhia Ĝi havis plej grandan klasan malamon kontraŭ sklavoposedantoj kaj ekkoleregis, ricevinte la anoncon pri vidiĝopeto de Konfucio. Li demandis la anoncinton: "Ĉu tiu ne estas la duvizaĝulo el Lu-regno Kong Kiu?" kaj ordonis komuniki al Konfucio, ke li "estas demagogo manipulanta artifikojn por trompi la mondon kaj konfuzi la publikon", kaj ke li "rapide foriru!". Sed Konfucio insistis ripetade pri sia peto de intervidiĝo, do Liuhia Ĝi fine enlasis lin.

Dum la intervidiĝo Konfucio montris sian ĝentilecon kaj kapbalancante kaj riverencante. Liuhia Ĝi laŭte diris al Konfucio kun rondigitaj okuloj, metante la manon sur glavtenilon: "Alproksimiĝu do! Se vi parolos bonsence, ni indulgos vin, alie gardu vian kapon!" Konfucio enkondukis sian parolon per serio da flataj vortoj kaj poste



*Liuhia Ĝi forte refutas Konfucion.*

komencis laŭdadon pri "bonmorala regado" de Venvang kaj Vuvang (la plej superaj estroj de sklavoposedantoj de Orienta Ĝoŭ-dinastio), provante konsili lin "ĉesigi la militon kaj malmobilizi la militistojn" por ke la sklavoj denove estu regataj kaj ekspluatataj de siaj mastroj, per mielaj vortoj pri bonkoreco, justeco, vero kaj moralo kaj per logado al alta pozicio kaj granda riĉaĵo, ke "estos konstruigita por via generala moŝto murego kelkcentkilometra" kaj "prezentita al vi la honora rango de landografo".

Aŭdinte la parolon de Konfucio, Liuhia Ĝi tre indigniĝis kaj tuj senmaskigis Konfucion, ke li estas hipokritulo miellanga kun glavo en la koro. Sur bazo de faktoj, li diris: "De la dinastioj Ŝang (ĉ. 17-a — ĉ. 11-a jc. a.K.) kaj Goŭ (ĉ. 11-a jc. — 771 a.K.) ĉiuj regantoj estis senescepte subpremantoj kaj trompantoj por la popolo, sub kiuj la popolo neniam povis vivi en trankvileco." En la ekstreme maljusta socio sub ilia regado, "la pli fortaj tiranas super la malfortaj", kaj unu parto de homoj subpremas alian. Demaskante Konfucion, li diris: "Via laŭdado pri Venvang kaj Vuvang de Ĝoŭ estas nenio alia ol provo mildigi la publikan opinion de la mondo kaj venenigi la postajn generaciojn . . . Vi aspektas kiel virtulo, havas mielan langon de demagogo kaj kondutas hipokrite por persvadi langografojn. Ĉion ĉi tion vi faras sole por ĉasi altrangan pozicion kaj grandan riĉaĵon. Tial vi estas la plej granda rabisto de neniu komparebla." Kaj li malkovris Konfucion plue: "Ĉu vi ne opinias vin multscia 'sanktulo'? Kial vi estas dufoje elpelita el Lu? Kial vi ne povis vin instali en Vej kaj trovi nenian sukceson en Ki? Kial vi estis sieĝita inter Ĉen kaj Caj kun nenio por plenigi vian stomakon? Vi migras de loko al loko kaj frapiĝas ĉiam kontraŭ muro. La mondo estas granda, tamen mankas al ĝi loko, kie vi povus instaliĝi! . . . Ĉu tio atestas ke la doktrinoj, pri kiuj vi persistas, havas ian valoron?!"

La senmaskigo farita de Liuhia Ĝi al Konfucio estis sentime kuraĝa kaj plene motivita surbaze de faktoj, tiel ke Konfucio estis tute embarasita kaj mutiĝis ne povante respondi. Fine Liuhia Ĝi diris decideme: "Ĉio kion vi fervore propagandas, estas nenio alia ol tio, kion mi naŭze forĵetis. Iru vian vojon kaj ĉesu kun via babilemo!" Konfuzite Konfucio urĝeme elglitis el la komandejo kun cindre pala vizaĝo kaj senbrilaj okuloj kaj klinis sin super la apogtrabo de sia ĉaro kun mallevita kapo anhelante.

La heroa historio pri karnotranĉa kritiko farita de Liuhia Ĝi kontraŭ Konfucio estas vaste cirkulata inter la laboruloj.

Inter Ni

# Respondoj pri abonado de nia gazeto

**Demando:** Kiu nun estas distribuanto de la gazeto EPĈ?

**Respondo:** Nia ĝenerala distribuanto nun fariĝas Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), kiu pro tio starigis jam speciale Esperantan Sekcion kaj uzas daŭre la adreson: P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Ĉar ĝi havas agentojn en diversaj landoj, sekve ankaŭ tiuj agentoj (librejoj) akceptas abonojn de nia gazeto. Se en iu urbo estas librejo, kiu vendas eldonaĵojn el Ĉinio, ĝi estas tre probable agento de Guozi Shudian, kiu lasta estas la sola eksportanto de ĉinaj eldonaĵoj. Pri tio oni tamen devas unue certiĝi ĉe la koncerna librejo. Se ĝi konfirmas tion, oni povas aboni nian gazeton ĉe ĝi, kaj tiu prizorgos la aferon por la paginto. Ĉu estas agento en iu urbo kaj kiu ĝi estas, pri tio oni kompreneble povas informiĝi letere ĉe Guozi Shudian.

Malnovaj perantoj de nia gazeto (esperantistoj) estis petataj daŭre funkcii, kaj oni povas aboni nian gazeton ankaŭ pere de tiuj perantoj.

Se iu abonas kaj pagas ĉe agento aŭ peranto, oni bonvolu doni la abonilon aŭ adreson ankaŭ al li kune kun la pago. Ne sendu ĝin aparte al Guozi Shudian! La abonitajn numerojn oni ricevos rekte de Guozi Shudian, al kiu la agento aŭ peranto ĉiam informas pri ricevitaj abonoj.

Nature oni ankaŭ povas aboni nian gazeton rekte ĉe Guozi Shudian mem laŭ la adreso menciita supre.

**D.:** Kiom kostas abono de EPĈ kaj kiel pagi la abonon?

**R.:** La abonkosto varias laŭ abondaŭro kaj lando. 2-jara kaj 3-jara abonoj estas kompare pli malkaraj ol la unujara. Abontarifon petu ĉe Guozi Shudian. Oni povas informiĝi ankaŭ ĉe agentoj kaj perantoj pri abonkosto por la koncerna lando.

La abonkoston oni pagu per mono al agentoj aŭ perantoj. Al Guozi Shudian oni povas pagi per ĉeko aŭ kambio aŭ sendi la sumon al:

A/C Guozi Shudian, Bank of China (banko de Ĉinio) 111 Cannon Street, London EC4N 5AS, Anglio kun la indiko: Por Esperanta Sekcio

**D.:** Ĉu vi povas informi min, je kiu numero finiĝos mia abono?

**R.:** La periodo de abono de ĉiu abonanto estas indikita supre sur la adresoslipo, kiun ĉiu abonanto de nia gazeto povas facile trovi sur la koverto de ĉiu ricevita numero. Ekzemple, "1/74 — 12/76" signifas: la abono komenciĝas de n-ro 1 de 1974 kaj finiĝos je n-ro 12 de 1976. Estas dezirinde ke la abonanto konstante tion legu por ke li povu ĝustatempe renovigi sian abonon kaj daŭre ricevi nian gazeton sen interrompo.

Se la abonanto deziras ŝanĝi sian adreson aŭ havas ian deziron koncerne sian abonon, li estas petata kunsendi tiun adresoslipon al Guozi Shudian (nur al ĝi). Tio faciligos la administracian laboron kaj akuratan plenumon de la deziroj.

**D.:** De kiu numero mi komencos ricevi, se mi nun faras la abonon? Ĉu mi povos ricevi la kompletan jarkolekton de 1975?

**R.:** Ĝenerale abonoj estas akceptataj tra la tuta jaro kaj komenciĝos de la tuj aperonta numero. Oni kalkulas 12 numerojn por unu jaro, 24 numerojn por du jaroj ktp.


Sed en speciale difinita periodo GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) kutime lanĉas kampanjon por varbi novajn abonantojn por la venonta jaro. Nun la kampanjo por 1975 jam komenciĝis. Se vi tuj abonos nian gazeton, vi povos ricevi la kompletan jarkolekton de 1975 kaj ankaŭ memoraĵon por abonantoj de la jaro (Esperanta kalendaro de 1975).

La distribuanto tre petas ke la abonantoj varbu por nia gazeto novajn abonantojn. Se vi sukcesos, bonvolu skribi al la distribuanto, kiu estas preta por sendi al vi ian memoraĵon kiel dankesprimon.

La Red.

## *Sur min la ŝarĝon*

pentrita de MIAŬ JINTANG






### AMASA SCIENCA EKSPERIMENTO PRI TERKULTURADO

Prospere disvolviĝas la amasa scienca eksperimento pri terkulturado en Guangdong-provinco kaj la partoprenantaj kamparanoj atingis pli ol milionon.

Guangdong-provinco ĉefe produktas rizon. Por pliprodukti rizon, diversaj lokoj de la provinco laŭbezone disvolvis sciencajn eksperimentojn pri plifekundigo de grundo, kulturo de bonaj specioj, miksa plantado, plibonigo de agrikulturiloj, akvoutiligo kaj uzado de sterkoj. Nun ĉiuj gubernioj de la provinco havas institucioj pri agrikultura scienco, granda parto de komunumoj kaj brigadoj tiucelajn eksperimentajn staciojn kaj pli ol 168,000 produktaj grupoj eksperimentajn grupojn. Dank' al tio multaj kamparanoj fariĝis teknikistoj kiuj posedas unufakan aŭ plurfakajn sciojn pri agrikulturo.

Post la amasa eksperimentado oni jam povas rikolti rizon trifoje en unu jaro anstataŭ dufoje en la pasinteco sur tero de granda areo en la provinco, kaj samtempe solvis la problemojn pri alta produkto de frumaturiĝinta rizo, konservo de fekundeco de grundo, racia alterna kulturado de plantoj kaj prevento de malutilaj insektoj. La kamparanoj jam efektivigis tri rikoltojn de rizo en unu jaro en la regiono norde de la norda tropiko, kie, oni opiniis antaŭe, tio ne povis esti farita. La pohektara produktokvanto de rizo atingis 22,500 kilogramojn kaj tiu de meza rizo altiĝis ĝis 6,750 kilogramoj.

# Bonvolu Aboni Nian Gazeton ĉe Jenaj Adresoj

(Adresoj kun stelo estas tiuj de esperantistoj)

**Aŭstralio:**

The East Bookshop
255 Rundle St.
Adelaide, S.A. 5000

East Wind Bookshop
397 Pitt St.
Sydney, N.S.W. 2000

East Wind Bookshop
Shop No.23, Fyshwick Plaza
63-65 Wollongong St.
Fyshwick 2609
Canberra, A.C.T.

J.R. Mcleod Publications Agency
36 Milton Street
West Melbourne, N.3
Victoria

☆S-ro Fritz Mueller-Sorau
11 / 242 Albany Rd.
Petersham, N.S.W.

**Aŭstrio:**

Buchhandlung
Brigitte Herrmann
Pachterin der Fa.
Last & Co. O.H.G.
Grunanger-Gasse 1
A-1010 Wien

Hubert M. Gaigg
Rudolf-Biebl-Str. 20/8
A-5020 Salzburg

H.Ulli
Mökerg. 3
A-1080 Wien

GLOBUS
1201 Wien
Höchstädtplatz 3

☆S-ino A. Sindl
Traiseng 26
A-3108 St. Polten-Wagram

**Belgio:**

Association Belgique-Chine ASBL
SERVICE LIBRAIRIE
Bd. Bischoffsheim 12
B-1000 Bruxelles
(*C.C.P. 2.61 Bruxelles Compte Courant 210-0694.768.09*)

☆Eldonejo-Librejo "Sonorilo"
Kerklaan 61
B-8000 Brugge
(*No. de la Pck 152140*)

**Britio:**

Bellman Bookshop
155 Fortess Road
London, NW5

Banner Books & Crafts
90 Camden High Street
London, NW1

Guanghwa Company
9 Newport Place
London, WC2

☆Brita Esperantista Asocio
140 Holland Park Ave.
London W. 11

**Danlando:**

Venskabsforbundet Danmark-Kina
Tidsskriftafdelingen
Studiestraede 18
DK-1455 Kobenhavn K

Foreningen Venskab med Kina
Geysergade 5
8200 Arhus N

☆Eldonejo KOKO
S-ino Edith Jensen
Post Box 952
DK 2400 Kopenhago NV

**Finnlando:**

Suomi-Kiina Seura
Erottaja 15-17
Skillnadsgatan
Helsinki 13

Rautakirja oy
Koivuvaarankuja 2
02670 Hämevaara

☆Fondumo Esperanto
Esperantotie 4
SF-02220 Iirislahti

☆S-ro Ahto Linja
Mannerheimintie 148 A. 26
00270 Helsinki 27

**Francio:**

Librairie LE PHENIX
72, Boulevard Sebastopol
Paris 3e
(*C.C.P. 17-217-63 Paris*)

E-100
Editions du Centenaire
Librairie "Les Herbes Sauvages"
70, Rue de Belleville
75020-Paris

Association des Amitiés FRANCO-CHINOISES
32, Rue Maurice-Ripoche
75014-Paris
(*C.C.P. 9455-10 Paris*)

Centre Culturel France-Chine
136, Quai du Port
13002-Marseille
(*C.C.P. 2583.66 Marseille*)

Librairie Populaire
226, Rue Duguesclin
69397-Lyon Cedex 3
(*C.C.P. 7435-58 Lyon*)

Librairie EUGENE POTTIER
36, Rue de la Clef
59000-Lille

☆Union Francaise pour L' Esperanto
4 bis, Rue de la Cerisaie
75004 Paris

(daŭrigota)

*Sur la Kovrilo:*

Ĉinaj sciencaj laborantoj inter glaciaj montoj de Ĝolmo-lungma





EL POPOLA ĈINIO 中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**
**P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 1 (198) 1975**

## Ĉefa Enhavo

Ne estas inflacio en nova Ĉinio ........................ 1
Impostoj en Ĉinio ........................................ 6
Solvo de Senlaboreco en nova Ĉinio ...................... 8
Grena memsufiĉo de Hebej, Ŝandong kaj Henan ...... 12
Familio de ordinara laboristo ........................... 17
Brila perlo sur la Flava Rivero ............................. 21
Arbara regiono de Granda Hing-an-montaro en konstruado ................................................ 24
Nova brilo de anestezo per ĉinaj tradiciaj drogoj ...... 27
Vjetnamaj esperantistoj en Ĉinio ........................ 30
Maligna inflacio ............................................ 33
Liuhia Ĝi refutis Konfucion ................................ 39



# Gimnastika aktivado de infanoj

Infanoj de la Gujlin-a Tualettuka Fabriko prezentas gimnastikon.

En Gujlin de Guanghi en suda Ĉinio, ĉiuj infanĝardenoj disvolvas gimnastikan aktivadon kaj iuj el ili eĉ fondis grupojn de gimnastiko. Nun en la aktivado partoprenas pli ol 2,000 infanoj en la urbo.



Ekzameni korpon por gimnastinetoj



Gimnastinetoj



Prezentado de infanoj
de gimnastika grupo



En la historio, la norda Giangsu estis loko kun malalta produkto pro multaj katastrofoj. Nun ĝi jam fariĝis unu el la ĉefaj produktejoj de greno kaj kotono de Ĉinio.

La norda Giangsu sin trovas en malsupra baseno de Huajhe-rivero. Antaŭ la Liberiĝo la rivero alportis al tieaj popolanoj profundajn suferojn. En la periodo de 1194-1949, pli ol 1,000 katastrofoj de sekeco kaj inundo okazis ambaŭborde de la rivero. Post la Liberiĝo la popolanoj de la loko fosis pli ol 30 grandajn kaj mezgrandajn riverujojn, konstruis pli ol 200 kluzojn, kuvertojn, ŝipkluzojn kaj 5 grandajn pumpstaciojn, dank' al tio pligrandiĝis drena povo kaj areo de irigaciaj kampoj atingis 1,600,000 hektarojn. La totala produktokvanto de greno je 1-oblo kaj tiu de kotono je 4-oblo plimultiĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.


# Nova fizionomio de kamparo en norda Giangsu



Kampoj en Gianhu-gubernio



Plenplenaj grentenejoj






Sanhe-kluzo, kiu baras kaj konservas akvon de la supra kaj meza basenoj de Huajhe-rivero por irigacii kampojn de ĝia malsupra baseno.



Draŝi rizon




## Arboha
## en



Akvoutiliga pivota konstruaĵo de Giangdu, kiun oni uzas por irigacii, dreni, produkti elektron kaj navigacii .




ado
Vintro




Kolektado de lignoj


Ĉangbaj-montaro de Gilin-provinco en la nordorienta Ĉinio estas unu el niaj ĉefaj arbaraj regionoj. Ĝi produktas bonkvalitajn lignojn, kiaj estas ruĝa kaj falfolia pinoj. Spite al frosteco kaj profunda neĝo laboristoj de la Forstuma Administracio de Bagiazi iras en montojn por haki arbojn. Ili superplenumis ŝtatan taskon de lignoproduktado en sinsekvaj jaroj.


Arbohakado





Lignoj atendas transportadon.





# La Plej Alta Montpinto de la Mondo


Ĝolmo-lungma staranta super Himalajo, je 8,882 metroj alta super la mara nivelo, estas la plej alta montpinto de la mondo. Ĝi troviĝas en landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo.

Depost la Granda Proleta Kultura Revolucio ĉinaj sciencaj laborantoj plurfoje faris plenampleksan kaj multfakan sintezan prospektoradon kaj esploradon al ĝi kaj akiris multajn gravajn materialojn pri kresko de Himalajo kaj ĝiaj influoj al naturaj ĉirkaŭaĵoj kaj homa vivo.

Ĝolmo-lungma-regiono sin trovas sude de 30 gradoj de norda latituto, je malpli ol 700 kilometroj fore de la Hinda Oceano. La kolosa korpo kaj terkrusto de la monto senĉese kreskas draste, kio kaŭzis fortan ŝanĝiĝon de la naturaj cirkonstancoj kaj formis vertikale klarajn zonojn kaj tute malsamajn aspektojn inter la norda kaj suda deklivoj. Ĝi estas rigardata kiel aparta geografia unuo. En alteco de 1,000 ĝis 7,000 metroj super la mara nivelo ĝi traspertas klimatan ŝanĝiĝon de varma, varmeta, malvarmeta kaj malvarma zonoj. Kun ŝanĝiĝo de alteco kaj klimato vegetaĵoj kaj animaloj sur la deklivoj sin trovas en diversaj naturaj zonoj. Pro tio ĝi liveras ne nur apartajn bonajn kondiĉojn por scienca esplorado, sed ankaŭ abundajn riĉfontojn por socialisma konstruado.



1



2

3.



4.



1. Sunbirdo vivanta en loko je 3,000 metroj alta super la mara nivelo

2. Longvostaj simioj en arbaro je 2,500 metroj alta super la mara nivelo


3. Rododendroj en loko je ĉirkaŭ 3,000 metroj alta super la mara nivelo

4. Primoloj sur deklivo je 3,500 metroj alta super la mara nivelo


5. 6. Iu speco de vegetaĵoj kreskanta en loko je 5,000 metroj alta super la mara nivelo

Sur la dorskovrilo: Miksita pinglo- kaj folio-arbaro sur sudorienta deklivo de Ĝolmo-lungma je pli ol 2,700 metroj alta super la mara nivelo

5.



6.





世界语《中国报道》一九七五年第一期（本刊代号：二　九一五）